

1984 novembro

77a jaro

n-ro 947 (11)


aperas monate (escepte de agosto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Venontjare al Aŭgsburgo



Vi trovos

ĉefartikolon, kiu kondukas nin en la temon de la Jubilea Jaro. La centjariĝo de Esperanto daŭre pli trovos lokon en nia agado. Kaj la artikolo de s-ino Renée Triolle konsilas kiel praktike informi. Pri tio plej grave temas la jubileo: celkonscie informi pri la Internacia Lingvo. Ĉu ni ne unue sciigu ĉiun pri siaj lingvaj kaj kulturaj rajtoj? Post tio venos la tempo por konstrui monumentojn. Se ŝanĝi la temon de la enhavo al la komunikilo, la revuo venas en viajn manojn pli malfrue ol ni planis. En la pasinta monato pluraj presejaj koboldoj provis frenezigi nin, ĝuste kiam ni faris nian eblon rekapti por vi la aperitmon. Ni esperis neniam mencii revuan prokraston, sed forigi ĝin. Ni tamen delonge konstatis, ke la nuna produktosistemo, parte en Roterdamo kaj parte en Antverpeno, ne povas taŭge funkcii. Eble venontjare venos solvo, kiu faros pli ol trankviligi la nervojn de la redaktoro. Intertempe ĝenu lin per viaj koncizaj reagoj kaj konsiloj.

Enhavo

- 181 Centjara Jubileo: Kune kreskigi la leviĝantan jubilean tajdon! (Renato Corsetti)
- 182 Lernejoj: Nun ankaŭ bulgaroj devige lernas Esperanton (Stojan Ĝuĝev); Novaj honoraj membroj (Paul Ariste, Hu Yuzhi, Emmanuel Chicot, Kiril Draĵev, Masao Miyamoto, Juan Régulo Pérez, Bruno Vogelmann)
- 184 Informado: Celkonscie informi (Renée Triolle)
- 185 Jubileoj: Prof. Lapenna 75-jara
- 186 Pupteatra Internacia Festivalo: 57 teatraĵoj de 18 ensembloj (Spomenka Štimec)
- 187 Venontjara kongresurbo: Aŭgsburgo: Du mil jaroj da historio bonvenigos vin
- 190 Universitatoj: La Universitato de Paco (Humphrey Tonkin)
- 191 Recenzoj: *Sferoj-3*; *Sciencfikcio kaj fantasto* Miguel Gutierrez Aduriz (D.J. Harlow); *Laktisto de Mäeküla* de Eduard Vilde/V. Kruusalu (Liao Zhigen); *Kiel bretono iĝis reĝo de Anglujo* de Per-Jakez Helias/F. Le Magadure (E. Formaggio); *Septembro estiĝos majo* N. Kjuĉukov (Zyun'iti Sibayama); *Saĝo-sako*; *Ĉinaj popolaj rakontoj* Fan Yizu (D. Besseghini); *Londono kantas* Londona Esperanto-Horo (Ch. Ioannu); *Gerda malaperis!* de Claude Piron (A. Brennan)
- 194 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 196 TEJO-paĝo: Tria japana-korea seminario
- 197 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 199 Oficiala informilo de la CO de UEA
- 200 Nekrologoj; Anoncetoj

La kovrilo

montras urban pejzaĝon de Aŭgsburgo. Jam la romia historiisto Tacitus (ĉ. 55-120 p.K.) nomis Aŭgsburgon "ekstreme pompa urbo". La mondfama germana poeto Goethe (1749-1832) nomis Aŭgsburgon "unu el la plej belaj urboj de la regno". Tio ja estas sufiĉa rekomendo por aliĝi al la venontjara 70a Universala Kongreso de Esperanto. La kongresa temo "Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?" invitas nin amase montri la atingojn el nia relative mallonga movada historio kaj la modernan, praktikan solvon, kiun ni proponas.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Graven-dijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Kune kreskigi la leviĝantan jubilean tajdon!

Estas bele de tempo al tempo vere praktiki internaciismon kaj lerni de niaj orientaziaj kolegoj kiel havi klarajn titolojn. Fakte la titolo, kiun mi elektis por ĉi tiu artikolo, resumas preskaŭ ĉion, kio en ĉi tiu momento estas plej dirinda pri la realigado de la jubilea programo de UEA kaj aliaj esperantistaj asocioj.

Kiam la Komitato de UEA aprobis antaŭ kelkaj jaroj la programon pri la Centjara Jubileo de Esperanto, mi demandis min, ĉu en la nuna ekologia situacio estos utile malŝpari bonajn arbojn por produkti paperon, sur kiu oni skribas laborprogramon post laborprogramo, kies nura efiko eble estos kreskigo de kelkaj arkivaj dosieroj de iuj landaj asocioj. Kiam UEA komencis sisteme realigi la aprobitan programon, multaj esperantistoj pensis, ke temas pri la kutima komenca entuziasmo, kiun eble forportos "vento subita".

Sed, malgraŭ ĉia provo subtaksi la aferon, mi ne povas ne agnoski, ke la respondo de la esperantistaro



William Auld redaktis du volumojn por Jubilea Kolekto de UEA: la *jus aperintan Esperanta antologio*; *Poemoj 1887-1981* kaj la presotan Nova Esperanta krestomatio.

al la alvoko por la jubilea festado estis granda kaj iusence "pasia". Ĉiuj landaj asocioj kaj ĉiuj fakaj asocioj eklaboris. Unuopuloj faris siajn proponojn. Fakaj kaj aliaj asocioj pretis eniri la internacian kunordigan komitaton, kiu nun jam estas starigita, kvankam ne tiel komplete, kiel UEA kaj pluraj aliaj esperantistoj deziris.

Estas malfacile en la limoj de ĉi tiu artikolo nun doni la liston de ĉio, kion oni faris kaj faras. Cetere, ni mem en UEA ne scias ĉion, kion landaj, fakaj kaj

lokaj organizaĵoj nun plenumas. Ĝenerale, tamen, legante ĉi tiun revuon, aliajn internaciajn kaj naciajn revuojn, oni ricevas la impreson, ke la supre menciita "pasio" estas ĉefa faktoro levanta la jubilean tajdon.

Ne ekzistas landa asocio, kiu ne jam projektis ion, apenaŭ ekzistas eldonisto, kiu ne jam eklanĉis sian jubilean serion, apenaŭ ekzistas loka grupo, kiu ne jam komencis pensi kiel kontakti sian urbestron por inda ceremonio.

UEA mem, trankvile kaj sen multa disanoncado, realigas sian programon. Tiuj, kiuj posedas la broŝuron kun la programo *Kiu faru kion?*, povas facile kontroli ĉi tiun aserton. La jubileaj simbolo kaj afiŝo estas elektitaj kaj vaste uzataj, la preparlaboroj por la jubilea kongreso kaj por la jubileaj festivaloj en apartaj kontinentoj (Ameriko, Azio, Eŭropo) antaŭeniras, *Esperanta antologio*; *Poemoj 1887-1981*, la unua eldonaĵo en Jubilea Kolekto "Jarcento de Esperanto" jam aperis ktp.

Granda parto de la laboro restas ankoraŭ antaŭ ni. La Estraro de UEA, komisiante min verki ĉi tiun artikolon, celis konsciigi la membrojn pri tio. Ju pli alproksimiĝas la Jubilea Jaro des pli la laboro fariĝos intensa kaj delikata. Pro tio ni bezonas ankoraŭ pli grandan disciplinon kaj dediĉitecon.

Se vi havas respondecan funkcion sur iu ajn nivelo de nia strukturo, sentu vin persone alparolata per ĉi tiu artikolo, kaj demandu vin, ĉu via organizaĵo faris ĉion, kion ĝi devus aŭ povus fari, kaj demandu vin, ĉu via organizaĵo estas en situacio fari tion, kion ĝi devos fari dum la venontaj jaroj. Se vi estas membro de UEA kaj de aliaj organizaĵoj, starigu al la koncernaj estraroj la ĉi-suprajn demandojn kaj proponu al ili vian kunlaboron. Sen kunlaboro eĉ la plej brilaj kaj bonintencaj estraroj estos senpovaj.

Memoru fine, ke UEA metis je via dispono apartan oficejon (Jubileo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio), kiu pretas respondi ĉiujn viajn demandojn kaj helpi al vi diversmaniere. Utiligu tiun servon, ĝenu nin per viaj demandoj kaj petoj.

UEA, krome, starigis fonduson – al kiu ĝi mem kontribuis dek mil guldenojn – por financi la jubilean laboron: Internacia Jubilea Fondaĵo. Ankaŭ tiu fonduso estas je via dispono, kaj ni ne ĝeniĝos, se vi kontaktos nin pri ĝi, des malpli se vi decidis kontribui al ĝi. Ni ne serĉas grandajn mecenatojn (kvankam ni estus feliĉaj, se ni trovus tiajn), ĉar la tuta centjara historio de Esperanto instruis al ni, ke Esperanto progresis ĉefe per sinapogo je propraj fortoj, tio estas je la "simplaj esperantistoj" kiel vi kaj mi.

Renato Corsetti

Nun ankaŭ bulgaroj devige lernas Esperanton

De post 1981 Esperanto estas nedevige instruata en la bulgaraj mezlernejoj conforme al dekreto de la Ministerio de Popola Klerigado. La Internacia Lingvo tamen restis ĉiam ekster la regula programo por deviga instruado en la mezlernejoj. Tiu situacio ne kontentigis la aktivulojn de la bulgara Esperanto-movado.

Laŭ iniciato de Neli Holeviĉ, estraranino de la regiona Esperanto-societo "Ivan Krâstanov" de Sofio respondeca pri laboro kun la junularo, la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio (BEA) oficiale proponis al la Ministerio de Popola Klerigado enkonduki Esperanton kiel regulan studobjekton (sub formo de eksperimento) en la tri lastajn gimnaziajn klasojn. Post longa prepara laboro (en kiu krom Neli Holeviĉ partoprenis ankaŭ Haĉik Haĉikjan, scienca kunlaboranto en Instituto por Eksterlandaj Studentoj, Marin Bâcev, lingva metodikisto ĉe BEA kaj prezidanto de Sofia Instruista Esperantista Societo, kaj Sijka Peltekova, direktorino de Sepa

Mezlernejo "Vasil Levski" en Sofio), la Ministerio akceptis la proponon de BEA.

La ĉefsekretario de la Ministerio de Popola Klerigado, Todor Angelov, la 11an de junio 1984 skribis al Sepa Unueca Meza Politeknika Lernejo "Vasil Levski" jene:

"La Ministerio permesas, ke ekde la lernojaro 1984/1985 estu formita, sur eksperimenta bazo, speciala lernogrupa en la sepa klaso por instruado de la angla lingvo dum tri lernohoroj semajne kaj de Esperanto same dum tri lernohoroj semajne, laŭ studplano de la lerneja direkto."

Tio estas grava sukceso de la Esperanto-movado en Bulgario. Dum tri lernojaroj – ekde la sepa klaso ĝis la fino de la mezlerneja kurso – grupo de 30 ĝis 40 gelernantoj studos *regule kaj devige* la Internacian Lingvon. Se la eksperimento sukcesos, ekzistos probable enkonduki devigan lernadon de Esperanto ankaŭ en aliajn bulgarajn mezlernejojn, kaj post preparo de kvalifikitaj instruistoj eventuale en ĉiujn mezlernejojn, kio egalvalorus oficialigon de la Internacia Lingvo en Bulgario.

Bulgario estas post Hungario la dua lando en la mondo, kie la Internacia Lingvo estas oficiale kaj devige instruata en mezlernejoj, kvankam ankoraŭ sub formo de pedagogia eksperimento. La estonteco dependos de la esperantistoj mem.

Stojan Ĝuĝev

Novaj honoraj membroj


Laŭ propono de la Estraro, la Komitato de UEA honoris en Vankuvero sep elstarajn esperantistojn. Du el ili fariĝis membroj de Honora Patrona Komitato, kaj kvin ricevis la titolon Honora Membro de UEA. La honoritoj estis:

Hu Yuzhi (Hujucz, 1896) lernis Esperanton en 1913. En 1919 li fondis Ŝanhajan Esperanto-Asocion. En la ĉina li verkis *40-jara jubileo de Esperanto* (1927) kaj plurajn lernolibrojn de Esperanto. En 1928 li partoprenis la 20an Universalan Kongreson en Antverpeno. Inter 1931 kaj 1949 li estis ĉefredaktoro de pluraj influaj ĵurnaloj kaj gazetoj en Ŝanhajo kaj Singapuro. Post 1949 li funkciis kiel vicministro por kulturo kaj ministro por eldonado. Li nun estas vicprezidanto de Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso (ĉina parlamento). En 1950 li lanĉis la gazeton *El popola Ĉinio*. En 1951 li fondis Ĉinan Esperanto-Ligon kaj estas ĝia nuna prezidanto. Hu fariĝas membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Paul Ariste (1905) lernis Esperanton 14-jara post konatiĝo kun la familio Dresen. Li poste laboris en la vortara komisiono por kompili ampleksan Esperanto-estonan vortaron, kiu aperis en 1927. De tiam

ĝis 1931 li laboris en la folkloro arkivo de Estona Nacia Muzeo en Tartu. En 1944 oni nomis lin kiel profesoron de la finn-ugra lingvoscienco en Nacia Universitato de Tartu, kie li ankoraŭ prelegas. Li publikigis 40 librojn, precipe pri la vota lingvo, kunlaboris por pluraj vortaroj kaj verkis preskaŭ mil artikolojn pri lingvoscienco kaj folkloro. Lia universitato eldonas la jarlibron *Interlinguistica Tartuensis*, de kiu li estas redakciano. Li estas de 1954 membro de Estona Akademio de Sciencoj, kie li redaktas *Soviet Finno-Ugric Studies*. Li estas honora membro de Finna Akademio, Hungara Akademio de Sciencoj, honora doktoro de la universitatoj de Helsinko, Tampere kaj Szeged. Ariste fariĝas membro de Honora Patrona Komitato de UEA.

Emmanuel Chicot (1909) konatiĝis kun Esperanto dum siaj studentaj jaroj. Li aktivis en la loka kaj nacia movadoj. De 1975 ĝis 1983 li estis la reprezentanto de UEA ĉe Unesko en Parizo. Li tuj formis laborgrupon por prizorgi la rilatojn inter UEA kaj Unesko. En 1976 li helpis organizi la simpozion de neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko pri la nova Internacia Ekonomia Ordo kaj sukcesis atingi, ke ĝi traktu ankaŭ la lingvajn dimensiojn de la demando. En 1977 li faris la necesajn preparlaborojn en Parizo por okazigi la viziton de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al la Univer-



De maldekstre: Masao Miyamoto, Juan Régulo Pérez, Kiril Drajev kaj Paul Ariste.

sala Kongreso de Rejkjaviko. En 1979, pro la agado de Chicot, UEA estis elektita en la estraron de Konstanta Komitato de Neregistaraj Organizaĵoj ĉe Unesko. Li trifoje reprezentis UEA en la Ĝeneralaj Konferencoj de Unesko. Li fariĝas Honora Membro de UEA.

Kiril Drajev (1904) lernis Esperanton kiel gimnaziano en 1921. Li fondis Esperanto-societon en sia hejmurbo, estis plurfoje estrarano de la Esperanto-Societo de Sofio, kursgvidanto, membro de Loka Kongresa Komitato de la Universalaj Kongresoj en Sofio (1963) kaj Varna (1978), redaktoro de Esperantaj elsendoj de Bulgara Radio, redaktoro de la turisma revuo *Ripozoj*. La ĉefa movada merito de Drajev tamen ligiĝas al la teatra arto en Esperanto. Li estas la fondinto kaj seninterrompa gvidanto de Bulgara Esperanto-Teatro (BET), kiu en 1983 festis 25 jarojn da eminenta agado. Por la repertuaro de BET Drajev tradukis en Esperanton pli ol 20 dramojn de mondkonataj klasikaj kaj de bulgaraj aŭtoroj. Drajev ludis gravan rolon en la Esperanto-teatro pli multe kaj pli longdaŭre ol iu ajn alia en la tuta kultura historio de la Internacia Lingvo. Drajev fariĝas Honora Membro de UEA.

Masao Miyamoto (1913) komencis lerni Esperanton en 1933. Antaŭ tio li laboris en ŝipfabriko kaj aktivis en laborist-sindikata movado. Pro kontraŭleĝa agado oni arestis lin en 1933, kaj li sidis en malliberejo dum du jaroj. En 1951 li fondis kun aliaj Kansajan Ligon de Esperanto-Grupoj kaj laboris kiel ĝia sekretario ĝis 1971. Li nun estas ĝia konsilanto. De 1975 ĝis 1980 li estis membro de juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj de UEA. Li estis membro de Literatura Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda. Li estas membro de la Lingva Komisiono de Japania Esperanto-Instituto. En 1976 Miyamoto iĝis neregula vizit-lektoro en Studejo pri Fremdlingvaj Kulturoj de Fremdlingva Universitato en Kôbe. En la Esperantomovado Miyamoto estas konata kiel fekunda verkisto

kaj tradukanto. En 1982 aperis lia ampleksa *Vortaro Esperanta-japana*. Miyamoto fariĝas Honora Membro de UEA.

Juan Régulo Pérez (1914) akiris en 1935 diplomon de Hispana Esperanto-Instituto. Ekde 1933 li estis ĵurnala redaktoro. En 1950 li doktoriĝis pri filozofio kaj beletro. De 1946 ĝis 1984 li estis profesoro en Universitato de La Laguna, Kanariaj Insuloj; de 1975 pri historio de la hispana lingvo. En Instituto pri Lingvoj de la sama universitato li estis profesoro de Esperanto. Li de 1955 ĝis 1962 estis redakciano de *La nica literatura revuo*. De 1952 ĝis 1975 li, sub la fama libromarko Stafeto, eldonis 94 kulture altvalorajn librojn en Esperanto kun entute 19 302 tekstopaĝoj. Li mem verkis artikolojn kaj eseojn en Esperanto. Li estas akademiano-korespondanto de Reĝa Hispana Akademio. Li verkis ok fakajn librojn en la hispana kaj redaktis plurajn librojn kaj fakrevuojn. Li estas membro de Akademio de Esperanto. Régulo fariĝas Honora Membro de UEA.

Bruno Vogelmann (1909) lernis Esperanton en 1926. Li poste iĝis instruisto, ankaŭ de Esperanto. Pro kontraŭfaŝismaj agadoj li perdis sian oficon en 1933. Li estis arestita, turmentita kaj dum pli ol kvar jaroj estis en malliberejo kaj koncentrejo de la nazia reĝimo. Eĉ tie li sekrete instruis la malpermesitan lingvon. Tuj post la milito li refondis la Esperanto-Societon de Heilbronn. Dum la sekvaj 30 jaroj li estris kemian fabrikon, kiu uzis Esperanton en la uzinformoj. En 1962 li eldonis la libreton *Esperanto en komerco*, kaj en la posta jaro li fondis kun aliaj Instituton por Esperanto en Komerco kaj Industrio. En 1974 ĝi eldonigis *Internacia komerca-ekonomika vortaro* en naŭ lingvoj, inkluzive de Esperanto. Dum la lastaj jaroj li laboris por efektiviĝi azian eldonon de la vortaro. Vogelmann plurfoje donacis grandajn monsumojn al triamondaj kaj netranspagipovaj landaj asocioj precipe per la rimedo de librodonaĵoj. Vogelmann fariĝas Honora Membro de UEA.

Celkonscie informi

Ĉu pro hazardo ĉu pro sperto, tri estraranoj de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) estas membroj de la Komisiono pri Informado de UEA, sub la gvido de estrarano de UEA Yosimi Umeda. Ni pensis, ke interesus tiujn, kiuj aktivas sur la informa kampo, legi pri kelkaj el niaj agadoj laŭ la laborplano de UEA, i.a. ĉar ni ne kutimas pensi abstrakte, sed agi.

Nia ĉefkonstato estas, ke por bone informi la eksteran publikon, necesas bone koni la Esperanto-medion, scii sufiĉe frue pri la okazaĵoj kaj elekti, kion plusendi al la ekstero.

Ni komunikas informojn pri Esperanto kaj ĝia movado al la **amaskomunikiloj**, por pluinformado per ili al la ĝenerala publiko. Ni:

- 1) sendas plurfoje jare la franclingvan "Espéranto-actualités" (Esperanto-aktualaĵoj) al 15 agentejoj, 153 gazetoj, 420 asocioj, 18 eminentuloj, 170 ĵurnalistoj, 28 eldonistoj, 125 abonintoj (asocioj, bibliotekoj),
- 2) sendas, okaze de specifaj aranĝoj, gazetaran komunikon al la agentejoj kaj gazetoj,
- 3) fare de niaj lokaj respondeculoj, sendas artikolojn de loka intereso al lokaj gazetoj, televid- kaj radiostacioj,
- 4) funkciigas "rebatservon", kio signifas, ke kiam aperas en iu ajn gazeto artikolo rilate al Esperanto aŭ pri la lingvoproblemo, venas skriba reago nome de UFE kaj de diversaj personoj tra Francujo.

La ĝisnunaj rezultoj de ĉi tiu regula informado dum tri jaroj estas, ke kelkaj gazetoj nun mem petas artikolon pri Esperanto, kaj enciklopedioj modifis siajn artikolojn, kiuj rilatas al Esperanto. Ĵurnalistoj de la grava nacia ĵurnalo *Le Monde* (550 000 ekzempleroj) proprainiciate konstatis, ke estus pli bone paroli Esperanton ol la anglan en Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj.

Por informi la **soci-politikajn mediojn** pri Esperanto kaj ĝia movado, ni:

- 1) de pluraj jaroj havas kontaktojn kun politikistoj, kio rezultigis i.a. la deponon de du leĝproponoj ĉe la parlamento kaj unu ĉe la senato. Por tiuj UFE ĉi-jare eldonis (vd. la januaran numeron de *Esperanto*) la prestiĝ-aspektan broŝuron *L'Espéranto: un droit à la communication* (Esperanto: rajto je komunikado). Ni metas ekzempleron de la broŝuro en manon de oficialulo post kontaktletero kaj rendevuo.
- 2) Ni aranĝis, ke lokaj respondeculoj kontaktu deputitojn okaze de balotoj kaj informiĝu pri ilia sinteno al lingvaj kaj komunikaj problemoj.

La sekvoj de ĉi tiu agado estas, ke ni havas tutan dosieron da belaj promesoj kaj citaĵoj, sed malmulte da konkretaj rezultoj.

Por aliri **pedagogiajn kaj edukajn instancojn** kun informoj pri la eblaj kontribuoj de Esperanto por iliaj celoj, ni:

- 1) regule sendas *Espéranto-actualités* al la edukaj instancoj, kun
- 2) la franclingva broŝuro *Culture et Espéranto* (Kulturo kaj Esperanto) de Claude Piron, kiu bonege argumentas kontraŭ la ofta aserto, ke Esperanto ne havas kulturon,
- 3) sendas liston de Esperanto-kursoj en lernejoj al instruistaj sindikatoj,
- 4) sendas informleteron kun la supre menciitaj dokumentoj al lernejoj, societoj de gepatroj,
- 5) organizis informan tagon por universitatanoj en Vincennes Saint-Denis apud Parizo.

La rezultoj el ĉi tio estas, ke listo de kursoj aperis en preskaŭ ĉiu sindikata bulteno. Kelkaj krome aperigis nian malfermitan leteron al la Ministro pri Edukado. Post la tago en Vincennes oni malfermis novan kurson en la universitato Paris VIII.

Malmulte estas farita por informi **sciencajn kaj teknikologiajn rondojn**, sed ni:

- 1) sendas informojn pri Someraj Universitataj Kursoj (Lieĝo, Belgio),
- 2) sendis leteron al gazetoj prikemiaj por adapto de la kurso por kemiistoj, aperinta en soveta gazeto (vd. *Esperanto*, julio-aŭgusto 1982).

Rilate informadon al **turismaj medioj**, ni:

- 1) precipe surloke starigas kontaktojn kun turismaj oficejoj por provi aranĝi aperigon de Esperanta versio de turismaj informiloj,
- 2) disdonas ĉe la budo de la turisma agentejo Trans-tours dum la turisma foiro de Parizo informilon pri Esperanto,
- 3) flegas kontaktojn kun Trans-tours por organizi karavanojn al kongresoj ks.,
- 4) aranĝis kurson por du profesiaj gvidantinoj de Trans-tours, por ke ili povu akompani esperantistajn karavanojn.

Nia agado krome inkluzivas informadon al la ĝenerala publiko, kreadon de franclingva teatraĵo pri komunikado "Babel aujourd'hui" (Babelo hodiaŭ) kune kun la teatra grupo Krizalido, starigon de muntebla ekspozicio, transportebla al diversaj regionoj, eldonado de lingvoludoj kun informoj pri Esperanto, diversaj informbroŝuroj kaj adresaro de lokaj respondeculoj. Ni krome kampanjas, por ke oni laŭ konscia elekto informu la strukturitajn asociojn, prefere ol dise informi unuopulojn.

Evidente ĉio ĉi kostas. Parton de la kosto transprenas UFE, parton la federacioj de lokaj Esperanto-grupoj, parton la kulturaj centroj aŭ individuoj.

Renée Triolle



Eminenta loko en la historio de la Esperanto-movado: Prof. d-ro Ivo Lapenna dum la 55a Universala Kongreso en Vieno (1970).

JUBILEOJ

Prof. Lapenna 75-jara

La 5an de novembro ĉi-jare prof. d-ro Ivo Lapenna fariĝas 75-jara. Kvankam li – laŭ propra decido (eksiĝo el ĉiuj funkcioj en UEA anoncita en la 59a Universala Kongreso, Hamburgo 1974) – dum la lastaj dek jaroj restas ekster la ĉefaj fluoj de la internacia Esperanto-movado, prof. Lapenna estas ankoraŭ konsiderata la plej granda organiza figuro en la historio de la movado por la Internacia Lingvo.

Jam kiel 27-jarulo Lapenna fariĝis, en 1936, prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, por du jarojn poste eniri la estraron de la tiama Internacia Esperanto-Ligo (IEL), kaj resti en la estraroj de IEL-UEA dum plenaj 36 jaroj, ĝis la eksigo en 1974. Lapenna estis ĝenerala sekretario de UEA de 1955 ĝis 1964, kaj prezidanto de UEA de 1964 ĝis 1974.

Multo – aŭ plimulto – de la iniciatoj kaj atingoj de UEA kaj de la tuta internacia Esperanto-movado en tiu periodo tre forte ligiĝas al la nomo de Lapenna aŭ rekte apartenas al liaj meritoj: solvo de la organiza dueco inter IEL kaj UEA (kiuj kunfandiĝis en 1947), ellaboro kaj akcepto de la unua postmilita statuto de UEA (kies ĉeftraĵoj konserviĝas ankaŭ en la nuna statuto de la Asocio), la fondo de la Centro de Esploro

kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, starigo de la Internacia Somera (nun: Kongresa) Universitato, vastigo de la rolo de la Universalaj Kongresoj, ligiĝo de TEJO al UEA, lanĉo de la revuo *La monda lingvo-problemo* (nun: *Language Problems and Language Planning*), akiro de la asocia domo en Roterdamo ktp.

Sendube, la nomo de prof. Lapenna pleje populariĝis en la Movado pro lia rolo en la akiro de la konsultaj rilatoj de UEA kun Unesko kaj pro la fama rezolucio favore al Esperanto de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954. (Pri la daŭra graveco de tiu rezolucio, kiu la 10an de decembro estos 30-jara, ĵus aperis, en nia oktobra numero, artikolo de Ralph Harry.)

Pluraj verkoj de prof. Lapenna ludis kaj ankoraŭ ludas gravan rolon, precipe sur la informa agadkampo de la Esperanto-movado. Tio aparte koncernas lian ĉefverkon *Retoriko* (1950, 3a eldono 1971) kaj la enciklopediecan *Esperanto en perspektivo* (1974), kiun li kunaŭtoris kaj ĉefredaktis.

Tamen, la ĉefa merito de prof. Lapenna estas lia kontribuo al la transformiĝo de UEA el kvazaŭ sekteca privata organizaĵo en internacie respektatan movadon, forte ligitan al la idealoj proklamitaj de Unuiĝintaj Nacioj. Interalie pro tio, prof. Lapenna konservos elstaran lokon en la historio de la Internacia Lingvo Esperanto.

57 teatraĵoj de 18 ensembloj

"PIF ne plu estas Esperanto-festivalo", komentis ĉi-jare iu rezignema esperantisto en unu el la dek unu prezentejoj. La organizantoj de la 17a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) kun kontento aprobis. Prave. PIF ne estas Esperanto-aranĝo, sed internaci-nivela kultura festivalo, organizata de esperantistoj, kun Esperanto kiel la ĉefa sed ne la sola lingvo.


Inter la 23a de aŭgusto kaj la 4a de septembro 57 teatraĵoj estis prezentitaj de 18 ensembloj el dek landoj. La kutima oktobra aranĝo fariĝis somera pro du kialoj. En aŭgusto okazis en Dresden (Germana DR) kongreso de Asocio Internacia de Pupteatroj (UNIMA) kaj PIF volis en Jugoslavio prezenti parton de la programo el Dresden, kie oni montris la plej pintajn atingojn el la pupteatra mondo. En aŭgusto gastis en Jugoslavio konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj PIF volis doni al Esperanto-instruistoj la eblecon konatiĝi kun la unika arta aranĝo, ĉe kiu pedagogia valoro ne mankas.

Nia unua intenco brile sukcesis. Dank' al la datŝanĝo PIF povis prezenti la plej renomajn japanan teatron PUK el Tokio, pupludojn el Havano (Kubo) kaj du altnivelajn kanadajn teatrojn: Coad Canada Puppets el Vankuvero kaj Le Théâtre sans Fil el Montrealo. El la konferenco de ILEI ne venis eĉ unu partoprenanto, kio, sen amaro, relevas ĉe ni la demando, kian kulturon efektive meritas la parolantoj de la Internacia Lingvo.

El 21 titoloj prezentitaj ĉe PIF ok estis en Esperanto: pupludo "Rajde-salte" de pupteatro Feniks el Niš (Jugoslavio), "Joĉjo Pipro" de Ŝtata Pupteatro Košice el Ĉeĥoslovakio, "La malbela anasido" de Ŝtata Pupteatro el Targovište (Bulgario), "Gnomaj infanoj" de Margrit Gysin el Svislando, "Rakontoj el infanaĝoj" de pupteatro Zadar (Jugoslavio) kaj "Bele funebrante" de Le Théâtre sans Fil (Kanado). La prezentadoj "Polly" kaj "Skatolo de sentoj" el Vankuvero revivigis Esperanton ĉe la teatro Coad Canada Puppets, kiu kontribuis al la programo de la 69a Universala Kongreso. Parte Esperanton uzis ankaŭ PUK el Tokio.

La televida stacio de Zagrebo elsendos en Esperanto unu-horan programon de la slovaka teatraĵo "Joĉjo Pipro", kiun tradukis E.V. Tvarožek, kaj la vankuveran teatraĵon.

La ĉi-jara PIF altiris pli ol 11 000 homojn al siaj spektejoj en kvar jugoslavaj urboj. Multaj partoprenantoj favore impresiĝis pri kulturaj eblecoj de Esperanto. Dum 13 tagoj Radio Velika Gorica ĉiu-



(Supre) Gaje funebrante de Le Théâtre sans Fil el Montrealo, (meze) neĝfeino logas ogrojn en Japanaj pupteatraj heredaĵoj de PUK el Tokio kaj (sube) Gnomaj infanoj de Margrit Gysin el Svislando.

tage disponigis 30 minutojn al PIF-partoprenantoj kaj gastoj, abunde garnante konversaciojn per prezento de muzika kulturo en Esperanto. Ĉiutage oni publikigis ampleksajn ĵurnalajn raportojn pri PIF, el kiuj kelkaj tutpaĝaj. Pli ol 70 artikoloj aperis lige al pup-teatrado kaj Esperanto.

D-ro Henryk Jurkowski el Varsovio, prezidanto de UNIMA, prezidis la ĉi-jaran fakan juĝkomisionon. Ĝi elektis la teatraĵon "Bele funebrante" de Roch Carrier la plej altnivela teatraĵo de la 17a PIF. D-ro Jurkowski jene komentis pri Esperanto ĉe PIF en raporto de la zagreba ĵurnalo *Večernji list* (400 000 ekzempleroj):

"Kio estas PIF en la kunteksto de internaciaj novaĵoj? Ĝi estas festivalo de aparta valoro kaj aparta etoso: ĉar ĝi okazas en Zagrebo, en Jugoslavio, ĉar ĝi estas iniciatita de esperantistoj, kiuj ligas la Esperanto-movadon kun la pupteatra mondo.

Esti esperantisto kaj esti pupisto egalas. Ĝi kontribuas al grandaj homaj klopodoj senantaŭjuĝe kunlabori kun konvinko, ke en ambaŭ kaŝiĝas... ŝanco por komunikiĝo.

Esperantistoj agas por komunikado per neŭtrala lingvo. Pupistoj agas por kompreniĝo per la lingvo de arto, kiu ĉiam apartenis al simplaj homoj kaj al poetoj. Esperantistoj kaj pupistoj estas estimataj pli de la homoj, kiuj ĉiam scias pli ol de simpluloj kaj hobiistoj. Nur kelkaj sentas kiom valoraj kaj noblaj estas klopodoj de esceptuloj. Esperantistoj kaj pupistoj estas sinoferaj homoj. Sed ilia sinofero havas nenion komunan kun elitismo. Esperantistoj kaj pupistoj estas malfermaj al la mondo, antaŭ kiu ili malkovras sian veron. Tio ĉi grandkvante sentiĝas ĉe la festivalo en Zagrebo..."

Eble aranĝontoj de Esperanto-renkontiĝoj en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Japanio, Kanado kaj Svislando ŝatus havi novan PIF-teatraĵon en siaj programoj, por sperti kiel rave gustas Esperanto, kiam ĝi alparolas nin de sur scenejo de profesiaj pupistoj.

La sekva PIF invitas vin renkonti ĝin en Zagrebo de la 12a ĝis la 16a de aŭgusto, post la venontjara Universala Kongreso en Aŭgsburgo. Informojn sendas Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Spomenka Štimec

VENONTJARA KONGRESURBO



Aŭgsburgo: Du mil jaroj da historio bonvenigos vin

El la ses ĝisnunaj Universalaj Kongresoj en Germanio neniuj okazis en ĉefurbo. Ankaŭ la 70a Universala Kongreso en Aŭgsburgo ne estos "ĉefurba" kongreso. Tio povas esti malfacile komprenebla por negermanoj. En aliaj landoj ĉio, kio okazas ekster la ĉefurbo, estas taksata kiel duaranga. Sed multaj elstaraj germanoj vivis kaj verkis en relative malgrandaj urboj. El tio originas iom de la multflankeco kaj forteco de la germana kulturo. Tial oni ne miru pri la elekto de Aŭgsburgo kiel kongresurbo por la Universala Kongreso de 1985.

En la sama jaro Aŭgsburgo festos la dumil-jaran datrevenon de sia fondiĝo kaj la 70a Universala Kongreso okazos en la kadro de tiu festado. Tial necesas rakonti iom pri la historio de la urbo.


En la jaro 15 a.K., laŭ ordono de la unua romia imperiestro Aŭgusto, romiaj legioj okupis la regionon inter la rivero Danubo kaj la montaro Alpoj, tiam loĝatan de keltoj. En la sama jaro la romiaj venkintoj fondis ĉe la kunfluo de la riveroj Lech kaj Wertach armean urbon, kiun ili nomis honore al la imperiestro kaj laŭ la kelta tribo vendelikoj "Augusta Vindelicorum". Tiu urbo baldaŭ fariĝis la ĉefurbo de la

romia provinco "Raetia". Aŭgsburgo estis unu el la plej gravaj romiaj urboj norde de Alpoj.

Historiistoj relative ofte menciis la urbon. Sed la plimulton de niaj scioj pri antikva Aŭgsburgo ni ricevis de elfosaĵoj. En la preĝejo de la iama Dominikana Monaĥejo troviĝas Romia Muzeo, kie oni povas rigardi la trovitajn elfosaĵojn. La kolekto ne estas tiel ampleksa kiel tiuj en la muzeoj de Kolonjo kaj Regensburg, sed altkvalita. Oni tie povas vidi laborilojn, ornamaĵojn, religiajn objektojn, ludilojn, partojn de konstruaĵoj kaj de legia forĝejo (entute 450 kilogramojn da feraĵoj). Plej interesaj estas tomboŝtonoj, kiuj ne nur mencias la mortinton, sed ofte ankaŭ bildigas ties vivon per tekstoj kaj skulptaĵoj.

La kelta lingvo tute malaperis en Aŭgsburgo, verŝajne jam en la romia epoko, kaj la kelta praloĝantaro miksiĝis kun la romianoj, kion klare pravas la tomboŝtonoj. Tra la urbo gvidis unu el la ĉefaj vojoj de la Romia Imperio "Via Claudia Augusta". Parto de ĝi nun estas la konata vendeja strato Maximilian.

En sia komenco la antikva Aŭgsburgo estis riĉa urbo, kun pompaj publikaj kaj privataj konstruaĵoj, sed jam de la tria jarcento p.K. la trovitaĵoj el la tomboj rakontas pri dekadenco. La arta nivelo malaltiĝis, dum la nombro de tomboŝtonoj de soldatoj kaj oficiroj altiĝis. Pro la pli kaj pli kreskanta premo de la ĝermanoj kontraŭ la norda limo de la Romia Imperio iom post iom Aŭgsburgo ree fariĝis armea urbo. En sia lasta romia periodo ĝi estis kristana urbo kun episkopo. Neniu historiisto raportas, kiam pereis la romia Aŭgsburgo, sed laŭ la arkeologoj la katastrofo okazis ĉirkaŭ 400 p.K. Tiam la ĝermana tribo de la alemanoj, prauloj de la nuna ŝvaba loĝantaro, konkeris la urbon. Aŭgsburgo ne estis detruita kiel urboj kun simila sorto. El la tomboj ni scias, ke apud la tiam ankoraŭ ne kristana ĝermana loĝantaro vivis malriĉa latineparolanta kaj kristana resto de romianoj. Ankaŭ la episkopoj restis en Aŭgsburgo.



La sola kanu-slaloma stadiono de la mondo kaj (dekstre) la domaro Fuggerei el 1521.



Sekvis jarcentoj, pri kiuj ni nur malmulton scias. Aŭgsburgo kiel episkopa urbo neniam fariĝis malgrava. Post la jaro 1000 Aŭgsburgo denove ekfloris. De tiu tempo konserviĝis la katedralo kun la plej malnovaj koloraj vitraloj en Germanio (12a jarcento) kaj la bronza pordego de 1014.

En 1276 Aŭgsburgo ricevis per dekreto de imperiestro Rudolf la Unua la statuson de "Libera Regna Urbo", t. e. sendependa urba respubliko en la Germana Regno. Tiam komenciĝis ekonomia evoluo, kiu 250 jarojn poste rezultigis la "oran epokon" de Aŭgsburgo, kiam la urbo estis unu el la plej gravaj ekonomiaj centroj de la mondo. Tiu evoluo estis ligita al du aŭgsburgaj familioj, Fugger kaj Welser. La unua Fugger venis al Aŭgsburgo kiel malriĉa teksisto en 1376. Lia pranepo Jakob Fugger "la riĉulo" (1459-1525) havis en Eŭropo la monopolon pri kupro kaj posedis la plej grandan bankon en la mondo. Li estis bankisto de imperiestroj, reĝoj kaj papoj. Per sia mono li decidis, kiu fariĝos la germana imperiestro. La tiama Germana Regno ne estis hereda, sed elekta monarkio. Kiu volis fariĝi imperiestro bezonis multege da mono, pri kio nur Fugger disponis. La komerca entrepreno de Fugger havis filiojn en preskaŭ ĉiu eŭropa lando, multflankajn rilatojn kun Suda Ameriko, Hindio kaj Ĉinio. Sed Jakob Fugger havis ankaŭ respondecon pri la malriĉuloj. Li kun siaj fratoj en 1521 kons-

truigis la unuan domaron por malriĉuloj kaj maljunuloj en la mondo, urbeton en la urbo, kiu ampleksas 147 loĝejojn, kies luprezo ankoraŭ hodiaŭ egalas al nur unu iama rejnlanda guldeno, t.e. 1,72 germanaj markoj jare! La nomo de tiu domaro estas "Fuggeri".

Simila entrepreno kiel tiu de Fugger estis tiu de la familio Welser. Ankaŭ ĉi tiu familio posedis grandan bankon kaj ludis gravan rolon en eŭropa kaj transmara komerco kun Suda Ameriko kaj Hindio. La ŝipoj de Bartholomeus Welser (1484-1561) velis al Suda Ameriko, kie li fondis kun konsento de la hispana reĝo propran kolonion, el kiu poste kreskis la ŝtato Venezuelo.

La riĉeco de la urbo altiris kaj subtenis la arton. El la multnombraj aŭgsburgaj artistoj mi mencias nur du: la pentristojn Hans Holbein, patro kaj filo. Ili apartenis al la plej famaj pentristoj de la 16a jarcento. El la "ora epoko" konserviĝis multaj interesaj konstruaĵoj, ekz. la impona urbodomo de la arkitekto Elias Holl (1615-1620), la baziliko de Sankta Ulrich (1477-1512) kaj la preĝejo de Sankta Anna kun la tomboj de la familio Fugger.

En la 17a jarcento la "ora epoko" finiĝis; mond-famaj tamen estas la aŭgsburgaj arĝentaĵoj kaj oraĵoj de la 17a kaj 18a jarcentoj, videblaj en muzeoj de la tuta mondo.

Menciinda estas ankaŭ evento de la 17a jarcento. Kiel la sola urbo en FR Germanio, Aŭgsburgo havas apartan festotagon, la 8an de aŭgusto. La tiel nomata Pacofesto rezultas el la interpaciĝo de 1648 inter la katolikoj kaj protestantoj. Dum tiu festotago ĉiuj butikoj estas fermitaj, la urbanoj havas liberan tagon kaj la kongresanoj ekskursos.

En 1806 la franca imperiestro Napoleono permesis al sia aliancano, la reĝo de Bavario, aneksi al sia teritorio la urbon Aŭgsburgo. Neniu ĝojkriis en Aŭgsburgo, kiam el mondkonata urba respubliko fariĝis ĉefurbo de la bavara provinco Ŝvabio. Sed la rezultoj ne estis tiel negativaj kiel multaj timis.

En la 19a jarcento Aŭgsburgo fariĝis unu el la ĉefaj industriaj centroj de suda Germanio. Rudolf Diesel, filo de aŭgsburga familio, inventis la dizelmotoron, kaj en la jaroj 1893-97 aŭgsburga fabriko perfektigis ĝin de nura projekto ĝis praktika uzebleco. Samtempe kun la ekonomia kresko ekfloris nova kultura vivo. Ekestis kelkaj vere vizitindaj muzeoj, kiel ekzemple Germana Barok-Galerio. Ankaŭ Bertolt Brecht naskiĝis kaj pasigis siajn junajn jarojn en Aŭgsburgo. De li ni klopodas surscenigi teatraĵon dum la UK.

Aŭgsburgo havas ankaŭ sufiĉe longan Esperanto-tradicion. En 1900 aŭgsburgaj civitanoj fondis Esperanto-grupon. En 1910 okazis Esperanto-Kongreso, unue deklarita kiel Universala Kongreso, kiu poste transformiĝis al la 5a Germana Esperanto-Kongreso. Post 1945 la Esperanto-grupo estis unu el la unuaj kul-

turaj grupoj, kiuj reviviĝis. En 1967 okazis Tutbavara Renkontiĝo, en 1970 la 43a kaj en 1977 la 50a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Dum la 56a Germana Esperanto-Kongreso oni inaŭguris Zamenhof-straton. En 1976 refondiĝis Bavara Esperanto-Ligo, kiu nun havas kelkcenton da membroj; la sidejo estas en Aŭgsburgo.

La nuna Aŭgsburgo estas vigla urbo de proksimume 250 000 loĝantoj, facile atingebla ĉu trajne ĉu aŭte. La bavara ĉefurbo Munkeno, kun 1 300 000 loĝantoj (la plej granda urbo en suda Germanio), estas trajne atingebla en maksimume 40 minutoj; Alpoj distancas je proks. 100 km. sude.

Kiel la ĉefurbestro skribas en sia saluto en la Unua Bulteno de la 70a UK, Aŭgsburgo ĉiam estis mondana urbo, malferma por spiritaĵoj kaj teknikaj novaĵoj. Tio same validas por la moderna urbo, kiu jam pro sia grava industrio tenas firmajn rilatojn en la tuta mondo. Efektive, en Aŭgsburgo troviĝas multaj industriaĵoj de tradiciaj teksaĵ- kaj paper-fabrikoj kaj maŝin- kaj aviadil-konstruado ĝis plej modernaj specialproduktejoj de robotoj. Ankaŭ la nun en Eŭropo multe diskutata katalizilo, kiu senvenenigas aŭtogasojn, estas produktata en la urbo.

Sur la kultura kampo Aŭgsburgo same povas fieri. La urbaj teatroj kaj koncertejoj konstante ofertas riĉan programon. Troviĝas ankaŭ muzik-akademio,

**Aŭgusto,
imperiestro
de Romio.
laŭ kiu oni nomas
Aŭgsburgon kaj la
kongresan monaton**



kiu portas la nomon de Mozarto, ĉar en Aŭgsburgo naskiĝis Leopold Mozart, patro de la mondfama komponisto W.A. Mozart. Allogaj estas ankaŭ la ĉiusomeraj liberaeraj operoj. Tre konata estas la marioneta teatro, kiu sub la nomo "Aŭgsburga Pupokesto" prezentas belajn programojn por multaj infanoj en multaj landoj per televido. La teatro disponas pri tri mil marionetoj! Aŭgsburgo estas ankaŭ sporta urbo kun pluraj stadionoj. Aparte fama en la regiono estas la speciala sporto de balon-ŝvebado. Okaze de la Olimpikoj de 1972 oni konstruis en la urbo la unuan kanu-slaloman stadionon de la mondo. Aŭgsburgo havas kvin ĝemel-urbojn en tri kontinentoj: Bourges en Francio, Dayton en Usono, Amagasaki kaj Naga-hama en Japanio kaj Inverness en Skotlando. Precipe kun Bourges la esperantistoj de Aŭgsburgo havas tre intensajn amikajn rilatojn.

Ludwig Röhl

UNIVERSITATOJ

La Universitato por Paco

"Militoj estas farataj en la mensoj de la homoj. Tial en la mensoj de la homoj oni devas konstrui la remparojn de la paco." Per tiuj famaj kaj trafaj vortoj malfermiĝas la Statuto de Unesko, organizo starigita en la postmilita periodo por certigi, ke humanecaj valoroj kaj civilizitaj institucioj anstataŭu la spektron de milito, kiu en tiuj tagoj ankoraŭ hantis la kampojn kaj urbojn de Eŭropo kaj Orienta Azio. La nobla celo de Unesko estas nenio alia ol per kultura kompreniĝo kaj internacia kunlaboro aboli la militon.

Malgraŭ tio, ke kelkaj homoj estas nun pretaj deklari tiun noblan eksperimenton malsukcesa, kaj malgraŭ tio, ke militoj grandaj kaj malgrandaj ankoraŭ disdividas la homojn, estus tro frue rezigni pri la idealo de Unesko. Male: necesas fari nian eblon per ĉiuspecaj institucioj atingi tiun pacan mondon, kiun ni celas. La bezono de paco kreskas proporcie al la kresko de la ludo de timo, la armila vetludo inter okcidento kaj oriento en la hodiaŭa mondo.

Paco ne estas nura manko de milito. Ĝi estas pozitiva kondiĉo. Ĝi ne venas al la homoj nature: oni devas esti edukata al ĝi. Jen la baza filozofio malantaŭ nova internacia institucio, kiu klopodas realigi en la praktiko la pacan idealon, kiun ni ligis al Unesko. Temas pri la Universitato por Paco.

La fondon de tiu nova universitato unue proponis la Prezidanto de Kostariko, s-ro Rodrigo Carazo, en parolado antaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 1978. Oni emas kredi, ke en la realpolitika etoso de Unuiĝintaj Nacioj idealismaj nocioj kiel tiu de s-ro Carazo – precipe kiam ili estas

prezentitaj de malgranda lando kiel Kostariko – renkontas nur surdecon. Sed la delegitoj aŭskultis atente. S-ro Carazo pledis por la kreado en la mondo de "kolektiva, pozitiva deziro por paco". Tion oni kreos precipe per "pedagogio de la paco", ellaborata en internacia universitato, dediĉita al "dokumentado, instruado, disvastigo kaj libera esplorado" de la idealo de paco. Li proponis, ke la universitato estu malferma al postdiplomaj studentoj el ĉiuj landoj, kiuj deziras studi la teknikojn de edukado por la paco kaj apliki ilin en la propraj landoj kaj medioj.

Du jarojn post la parolado de prezidanto Carazo, la 5an de decembro 1980, la Ĝenerala Asembleo akceptis rezolucion, kiu starigis la Universitaton por Paco en Kostariko, kun ĝia propra statuto kaj strukturo. Hodiaŭ la universitato havas propran teron ekster San José, la kostarika ĉefurbo, kaj jam kelkaj konstruaĵoj estas pretaj. Tie, en medio aŭtentike internacia, la studentoj lernos kiel kompreni kaj analizi sociojn por krei en ili pacajn kondiĉojn. Ili lernos pri la sociaj tensioj malantaŭ militaj konfliktoj. Oni instruas al ili kiel komunikiĝi, kiel peri interkonsentojn inter konfliktantoj, kiel trovi komunan grundon. Samtempe la universitato prezentos al siaj studentoj studprogramojn pri la internacia vivo ĝenerale – pri homaj rajtoj, pri ekonomia evoluigo, pri transigo de teknologio. Ĝiaj gvidantoj klopodos aliri tiujn demandojn per kunligo de la disciplinoj, koncentante ilin al difinitaj problemoj kaj situacioj.

Universala Esperanto-Asocio sekvis la starigon kaj nun sekvas la evoluon de la Universitato por Paco deproksime. La reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de UN ĉe la Konsilio de la Universitato estas s-ro Robert Muller, malnova amiko de la Asocio bone konata pro sia ĉeesto de la Universala Kongreso en Lucerno. Alia konsiliano, s-ro José Miguel Alfaro, iama Vicprezidanto de Kostariko, partoprenis la konferencon de CED, la esplora fako de UEA, en Novjorko en decembro 1982. UEA estas ankaŭ aktiva kunlaboranto en grupo de neregistaraj organizoj, kiuj kunsidas regule en Novjorko por plani la studprogramon de la universitato. Ĝis nun la universitato ne faris decidon favore al Esperanto, sed ĝi ja montris favoran interesiĝon kaj, dank' al la laboro de UEA, ĝi fariĝas pli kaj pli konscia pri la rolo de lingvoj en interhoma konflikto.

En sia parolado antaŭ Unuiĝintaj Nacioj en 1978, s-ro Carazo atentigis pri la malnova latina maksimumo "Se vi deziras pacon, pretigu militon" (Si vis pacem, para bellum). "Kontraŭ tiu milita principo," diris s-ro Carazo, "la Universitato por Paco proponas homecan principon: "Se vi deziras pacon, pretigu pacon" (Si vis pacem, para pacem)." Sub tiu devizo la laboro de la Universitato por Paco antaŭeniras. Ĉu baldaŭ la devizon oni esprimos ne en la latina sed... en Esperanto?

Humphrey Tonkin

Parte sukcesa volumo de nia sciencfikcio

Sferoj – 3; Sciencfikcio kaj fantasto, div. aŭtoroj. Komp. Miguel Gutierrez Aduriz. Santander: la kompilinto, 1984. 130p. Ilus. de José Torres. 19cm. ISBN 84 398 1230 2. Prezo: 18,00 gld.

Malsame de la antaŭaj volumoj en ĉi tiu serio, *Sferoj – 3* prezentas ekskluzive originalajn rakontojn verkitajn de esperantistoj. Tio povas esti kaj avantaĝa kaj malavantaĝa. Avantaĝa estas tio, ke la unuan fojon niaj verkistoj havas taŭgan forumon por elmontri siajn sciencfikciajn kapablojn. Malavantaĝa estas tio, ke ĝenerale kolektoj de originalaĵoj ne montras la saman selektivon, kiun oni trovas en antologio. Ĉi tiu kolekto nek povas esti nek estas escepto.

En la libro troviĝas dek du verkoj de ok verkistoj. Ĉiun novelon enkondukas bildo tre lerte kaj profesie desegnita; la nomon de la artisto José Torres oni devas aparte memori. El la rakontoj tri estas, laŭ mia opinio, sukcesaj: "Mato" de István Nemere, pri la plej grava ŝakpartio en la historio, "La temŝtelisto" de Csaba Finta, pri plagiato kaj ties puno, kaj "Rust" de Liven Dek, pri robota venĝo. El la aliaj noveloj, "La psikobirdo" de Nemere ŝajnas esti intrigo por holivuda filmo. Nur simplaj vinjetoj estas "Tamen spuro restas" de Petro Nuez kaj "Epidemio" de Miroslav A. Andrić. "Kien vi iras, maljunulo?" de Liven Dek estas ne plene evoluinta, dum "Vitaliumo" de Poul Thorsen estas rerakontaĵo pri la mita Mirakla Karburilo. "Senfina ludo" de Andrić (ankaŭ ŝakrakonto) mi trovis ne tute komprenebla. "Destinoj de la konscio" de Andrić estas provo redukti la romanojn de Olaf Stapledon al tri paĝoj. Pri "Planedo de amo" de Kovács Béla mi preferas diri absolute nenion.

Plej ambicia estas la novelo de Bernard Golden: "La debuta lunvojaĝo de Seleno I". Tiu unu novelo

akaparis preskaŭ trionon de la libro (ĝi estas 29-paĝa). Ĝi estas amuza, facile legebla leĝeraĵo. La persono de unu el la rolantoj, s-ino Levy, estas (kun tiu de la homa protagonisto de "Rust") la plej bone ellaborita en la libro. Tamen mi trovis ĉi tiun novelegon ne tute sukcesa. La etoso estas 1930-eca (privata konstruita kosmoŝipo, rolantoj ĝenerale usonaj, specimena ĉino kun specimenĉina nomo Fang Goo). Ekzistas unu-du nekonsekvencaĵoj: ekzemple la tre amuza avertado de d-ro Jullien pri la danĝero de *post coitum adhesio* estas nepravigebla laŭ la sekvo. Pli ĝenaj por mi estis la du gravaj senzorgaĵoj, kiujn mi trovis. Unue: oni disdonis trinkaĵojn en glasoj, la ŝipo tre skue lanĉiĝis, kaj nur poste oni reprenis la malplenajn glasojn (eble ili sidis sur tabloj dum la lanĉo?). Due, kaj pli grave, Golden lokis la Sieranevadan Montaron okcidente de Sakramento, dum tiu montaro efektive turnas 130 km. oriente de tiu urbo.

Ĉu la libro entute sukcesis? La nesperta leganto, traleginte miajn supraĵajn rimarkojn, supozos, ke ne. Tamen ni ne forgesu la konatan Leĝon de (Theodore) Sturgeon: "90% de sciencfikciaĵoj estas balasto; tamen 90% de ĉio estas balasto." Laŭ tiu kriterio, libro kiu prezentas tri sukcesajn kaj unu parte sukcesan rakontojn el entute 12 ja estas sukceso.

Donald J. Harlow (Usono)

Soci-psikologia romano el Estonio

Laktisto de Mäeküla (1916), Eduard Vilde (1865-1935). El la estona trad. Valev Kruusalu. Tallinn: Eesti Raamat, 1983. 255p. Ilus. 17cm. Prezo: 13,50 guldenoj.

La aŭtoro Eduard Vilde (aŭ Wilde) estis estona verkisto, vivanta sub la regado de cara Rusio. Antaŭ sia famiĝo li verkis jam dekojn da noveloj. Lia unua fama romano *Al malvarma lando* ĝuis grandan reputacion inter la malriĉaj estonaj kamparanoj. En 1933, mallonge antaŭ sia morto, li skribis alvokon kontraŭ la faŝismo, kiam faŝismo prenis la potencon en Germanio kaj estonaj faŝistoj sin ekmovis.

Laktisto de Mäeküla estas la lasta romano de Vilde. Ĝia rakonto okazas en norda Estonio en la lasta jardeko de la 19a jarcento, kiam la servuteco jam komencis cedi al kapitalismo. La heroo en la romano, Tõnu Prillup, estis vidviĝinta farma kamparano. Li sukcesis svati al si fratinon de sia mortinta edzino, la junan Mari, kiel sian novan edzinon. Al ŝi enamiĝis maljuna fraŭlo Ulrich von Kremer, balta germano kaj la posedanto de la nobelbieno. Von Kremer proponis al Prillup la profitodonan oficon de la laktisto de sia nobelbieno, se li devigos sian junan edzinon Mari fariĝi lia amatino. La romano priskribas la deziron de



Prillup fariĝi bonstata je ĉia ajn kosto. Per konvinka psikologia analizo kaj arta kapablo Vilde montras al la leganto la suferojn de Prillup dum ĉi tiu rompas la reziston de Mari, kio samtempe estis la komenco de lia morala falo.

Mi ne trovis la Esperantan tradukon tute glata. Sur paĝo 135 kaj aliaj paĝoj aperas la vorto *kikerikas*, kiu devus esti "kokerikas".

Estonio estas la plej malgranda respubliko de Soveta Unio, kun iom pli ol unu miliono da loĝantoj, do eble multaj esperantistoj ne konas ĝian literaturon. Ĉi tiu romano helpas ŝtopi tiun breĉon.

Liao Zhigen (Ĉinio)

Kvar bretonaj fabeloj

Kiel bretono iĝis reĝo de Anglujo, Per-Jakez Helias (1914). El la franca trad. Frédéric Le Magadure. Eldonloko ne indikita (Francio): Grupo de Esperantistaj Edukistoj, 1983 (ne indikita). 56p. Ilus. 21cm. ISBN 2 86775 001 4. Prezo: 6,30 gld.

Tiu ĉi simplaspekta fabellibro pere de siaj kvar rakontoj portas la leganton en plene bretonan etoson. Oni vidas antaŭ si la bretonan kamparan socion komence de la nuna jarcento, lerte pludonitan de la aŭtoro al la hodiaŭa leganto. Al Per-Jakez Helias oni danku la plej ampleksan kolekton de bretonaj fabeloj, kiuj spegulas la tiaman kamparan vivon. Li eternigis la rakontojn, kiuj dum jarcentoj iris voĉe de generacio al generacio. Ĝuste el tiu kolekto oni ĉerpis la kvar tradukitajn rakontojn.

Necesas mencii, ke ankaŭ la ilustraĵoj estas tre atentokaptaj. Ilin desegnis bretonaj infanoj, al kiuj la fabeloj estis origine destinitaj. Pere de ĉi tiu traduko ili fariĝos konataj dise tra la mondo. Plie, la grandlitera kaj ne tro densa preso faciligas la legadon.

Ĉi tiu libro estas laŭdinda kontribuo al la tradukita Esperanta literaturo, kaj ĝi memorigas, ke la bretona kulturo, kvankam ne tre vaste konata, ne estas malpli valora ol la aliaj.

Eva Formaggio (FR Germanio)

Antologio pri ribelo

Septembro estiĝos majo, komp. N. Kjuĉukov, red. L. Raeva. Sofio: Sofia-Pres, 1983. 192p. 20cm. Prezo: 13,20 gld.

"Oni povas esti tiel kruela, ne nur en milito kontraŭ alinacianoj, sed ankaŭ inter samnacianoj, kontraŭ ribelantoj por libero". Jen la unua impresado de la libro, priskribanta la popol-leviĝon kaj ties subitan falon en 1923 – en Bulgario, kie hodiaŭ pace vivas homoj en rikoltorika regiono. Ĉi tiu libro konsistas duone el poemoj, duone el noveloj aŭ fragmentoj el romanoj, pri la "Septembra Ribelo", malsukcesinta

revolucio de la popola fronto kontraŭ faŝisma diktaturo. Kaj ĝi prezentas t.n. "septembran literaturon", vekiĝon de socialisma realismo en Bulgario. El la 25 verkintoj en tiu ĉi kolekto, tri estis mortigitaj de la faŝisma registaro. Estas dek paĝoj da originalaj poemoj en Esperanto, kiuj atestas siatempan engaĝitecon de esperantistoj.

Se doni la historian perspektivon: en oktobro 1922 Mussolini fondis faŝisman registaron en Romo, en januaro 1923 Soveta Unio estis fondita, en junio 1923 la demokratia reĝimo bulgara estis puĉe faligita de faŝistoj – kaj baldaŭ venis la septembro. En tiu ĉi kolekto, gvida estas epopeo "Septembro" de Geo Milev, unu el kies versoj oni prenis kiel la titolon de la libro. Ĝi kantas i.a.: *Miloj da kredoj / – kred' je popola leviĝ', / miloj da volo / – volo je vivofeliĉ' / ...* kio brave rakontas la fonon de la leviĝo. Ankaŭ ĉapitro el la romano *Vilaĝo Borovo* de Krum Velkov estas prezentita, kaj lastatempe aperis ĝia plena Esperanta traduko en aparta libro.

Redaktoteknike la libro estas plaĉaspekta, kun glosoj paĝofine kaj prezento de la verkintoj librofine. Sed, kial oni devas tranĉi kelkajn paĝojn? Kaj kiam oni disponas pri la litertipo ŭ, kial uzi ŭ en iuj paĝoj?

Resume, la libro viciĝas inter la realismaj literaturajoj de la nuna jarcento.

Zyun'iti Sibayama (Japanio)

Sako da saĝo el Ĉinio

Saĝo-sako; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina trad. Fan Yizu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 73p. Ilus. 18cm. Prezo: 3,00 gld.

Balagenca, Agu Dumba, Hoĝa Nasar, Aldil Kusa kaj Buho estas la sama persono. Pli ĝuste, tiuj nomoj



estas uzataj de diversaj ĉinaj naciecoj por indiki samtipajn heroojn. Temas pri ruzuloj, kiuj, nur per sia lerteco kaj malgraŭ sia kamparana naskiĝo, sukcesas kontraŭstari la feŭdajn bienulojn kaj defendi siajn samklasanojn. Ĉar la feŭdan stadion trapasis pli-malpli ĉiuj socioj, tiaj herooj estas facile troveblaj ankaŭ ekster Ĉinujo. Dum la legado de tiu ĉi libro, en kiu estas kolektitaj iliaj aventuroj, mi memoris pri la itala Bertoldo kaj pri la greka Karagjozis.

La libro estas certe rekomendinda por komencantoj, kiuj ĝuu ties ekzotikan atmosferon, sed tia prezento ne estas sufiĉa: ĝi estas leginda en si mem, ankaŭ por ĉiel lingvospertaj homoj. Ĝia lingvaĵo – polurita de Geoffrey Sutton – estas fakte modelo de facileco kaj samtempa precizeco: ne ŝokante la okcidentanojn per "strangaj" konstruoj, ĝi tamen sukcesas doni impreson pri ne-okcidenteco kaj respekton al la diverslingvaj originaloj. Oni lernas, ke la mongoloj estis regataj de "centfamiliestroj" kaj "milfamiliestroj". Se oni tion tradukus italen, oni devus laŭ la kutimo uzi nekompreneblajn fonetikajn transskribojn el la mongola. Multaj tiaj ekzemploj estas citeblaj. La fakto, ke en la libro troviĝas malmultaj piednotoj ne signifas do, ke ĝi ne estas informa: tute male, oni lernas multon en ne teda maniero. Ĉina Esperanto-Eldonejo havis tre bonan ideon aperigi tian kolekton de rakontoj kun inter si simila strukturo. Ĝi ebligas subtilajn komparojn inter la diversaj socioj kaj kontribuas al la malapero de la okcidentana antaŭjuĝo, laŭ kiu ekzistas nur "ĉinoj": ĉi tie temas pri mongoloj, tibetanoj, kazaĥoj, jaŭoj ktp. Mi senpacience atendas la aperon de aliaj tiaj libroj, kiuj konatigu al ni la rakontojn de aliaj naciecoj. Jam ekzistas *Rakontoj pri Afanti*, la heroo de la uĝuroj.

Mi promesas unu sakon da zanbao (p.30) al tiu, kiu trovos eŭropan nacian lingvon, per kiu oni povas konatiĝi kun tiel multe da interesaj rakontoj.

Dario Besseghini (Italio)

Distra instruhelpilo

Londono kantas, Londona Esperanto-Ĥoro. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1983. Kaseto, kun tekstofolioj. Prezo: 16,50 gld.

La aŭskultanto de ĉi tiu kaseto unue rimarkas la tre sukcesan elekton de kantoj vere agrablaj kaj vaste konataj al la muzikama publiko. La plejparte simplaj kaj ofte naivaj kantotekstoj estas – dank' al la klara artikulacio de la kantantoj – facile kompreneblaj eĉ de ne tre spertaj parolantoj de Esperanto. Tio signifas, ke la kaseto povas esti facile uzata kiel distra instrumaterialo en Esperanto-kurso.

Certe, la sperta orelo rimarkos muzikajn mankojn kaj erarojn. Estas evidenta la neesto de

FACETOJ

Dua poemaro

originale verkita en Esperanto de

Rejna de Jong

Poemoj lirikaj, socikritikaj, humuraj.

42 paĝoj.

Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam aŭ rekte ĉe la aŭtoro, Tomatenstraat 5, 2321 HC Leiden, Nederlando. Prezo: 5,10 gld. plus sendokostoj.

majstro de la ĥoro, kiu povus eviti certajn mankojn, kiel estas la tre rapida tempo en plimulto de kantoj, la nesufiĉa sinkroneco de voĉoj kaj muzikaj instrumentoj kaj ofte la manko de izokroneco inter la voĉoj mem.

En la ĥoro, evidente malmultpersona, oni tre malfacile povas distingi kvar voĉojn. La kaseto tute ne konvinkas, ke vere temas pri kvarvoĉa ĥoro. Oni tamen notu, ke multon kontribuas al la tuto la muzikiloj, tre kontentige luditaj.

Estas juste konstati, sume, ke la kaseto, produktita de neprofesiuloj, tamen superas la nivelon de certaj similaj, amatoraj kolektoj, kiujn mi jam gustumis. Ĝi ja ofertas al la ne tre postulema aŭskultanto vere agrablan muzikan Esperanto-ĝuon.

Christoforos Ioannu (Greklando)

Lingvo-instrua romaneto de Piron

Gerda malaperis!, Claude Piron (1931). Chapecó: Fonto, 1983. 48p. 21cm. Prezo: 3,60 gld.

Ĉi tiu estas ne nur legolibro, sed samtempe Esperanto-kurso. Ĝi enhavas plenan aventur-romaneton, kies lingvaĵo fariĝas pli riĉa iom post iom dum la daŭro de la rakonto. Sufiĉas, ke komencanto eklegu la unuan ĉapitron, dum instruisto laŭnecese klarigas la renkontatajn vortojn kaj gramatikajn strukturojn. Ĉiu nova ĉapitro prezentas pliajn lernendaĵojn, tiel ke la lernanto senkonscie ensorbas ilin dum la legado. Laŭ tiu sistemo formala instruado ne necesas, almenaŭ por parolantoj de tiuj lingvoj, kiuj pli similas al Esperanto.

Esenca en lingvolernado estas la ripetado. Tio povas esti teda parto de tradicia kurso, sed en ĉi tiu romaneto la ripetoj aperas nature en kunteksto. Dum la komprenkapablo de la leganto kreskas, la kvanto da nova materialo malpliĝas, de 100% en la unua ĉapitro al 18% en la dua kaj al nur 3% en la lasta.

Ĉu tamen eblas verki interesan tekston dum oni plenumas tiajn komplikajn postulojn? Piron montras, ke jes. Evidente, ĉi tiu romaneto ne estas komparebla kun lia *Ĉu...?*-serio (kaj ne uzante sian pseŭdonimon, li ne invitas al tia komparo), tamen ĝi estas multe pli leginda ol kutima lernolibro.

Oni rajtus demandi, ĉu la vortprovizo de krimromano utilas por komencanto. Piron bazis sian vortprovizon sur la oftecolisto de Internacia Kultura Servo en Zagrebo. Do la vortoj instruataj en ĉi tiu libreto estas fakte tiuj plej ofte uzataj en ordinara parolado. (Kompreneble, necesis aldoni kelkajn fakajn vortojn por la apartaj bezonoj de la rakonto.)

Mankas nur unu afero, por ke ĉi tiu libreto estu kompleta instruilo. Tio estas la vortlisto kaj la paralelaj tekstoj, anoncitaj en la interna kovrilo. Jam aperis vortlistoj en iuj lingvoj, aliaj lingvoj atendas. Eblas uzi la libron sen la aldonaĵoj, sed instruisto certe preferus havi ilin, se eble. Eĉ en la nuna formo, la libro povas konsistigi la bazon de kurso – kaj mi forte rekomendas al instruistoj, ke ili provu la eksperimenton.

Anna Brennan (Italio)

Laste aperis . . .

Aforismoj, Ŝota Rustaveli. El la kartvela trad. Zurab Aleksandroviĉ Makaŝvili. Tbiliso: Mecniereba, 1983. 78p. Mimeo. 20cm. Dulingva: kartvela-Esperanta. Elektitaj aforismoj de la plej fama kartvela poeto, verkitaj en la 12a jarcento. Prezo: 6,00 guldenoj.

Ĉu vi pretas trinki teon ĉe malriĉuloj? Stefano Keller. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1984. 12p. Mimeo. 30cm. La Esperanta agado en Srilanko kaj ties problemoj, spertitaj de la aŭtoro. Prezo: 6,00 gld.

Danco ĉirkaŭ lokomobilo (1971), Mats Traat (1936). El la estona trad. Hillar Saha kaj Henrik Seppik. Tallinn: Eesti Raamat, 1984. 174p. 17cm. Romano pri la estona kampara vivo, de fekunda nuntempa prozisto kaj poeto. Prezo: 9,60 guldenoj.

Domiling 1, oftaj substantivoj. Lingva ludilo por 7- ĝis 14-jaruloj, konsistanta el 48 plastaj ludpecetoj, kiuj surhavas desegnitajn objekton kaj alirilatan vorton. La kombino de la ludpecoj funkcias laŭ la reguloj de domeno. Kun Esperanta kaj hungara instrukcioj. Prezo: 21,00 gld.

Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981, red. William Auld (1924). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld.). 12+888p. Ilus. 22cm. Bind. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Reviziita kaj kompletigita eldono de la fama *Esperanta antologio* (1958). Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj, kolektitaj el revuoj kaj volumoj plejparte ne plu haveblaj. La antologio donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto; kun Postparolo de William Auld kaj 36 paĝoj da biografiaj notoj. Prezo: 60,00 gld.

Espéranto et l'année internationale des personnes handicapées 1981, L', Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 8p. 21cm. ISSN 0165-2621. Documents sur l'Espéranto 17F. Prezo: 3,00 gld.

Eta princo, La (1943), Antoine de Saint-Exupéry (1900-1944). El la franca trad. Pierre Delaire (1918). Montrealo: Kanada Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld.). 93p. Kolorilus. de la aŭtoro. 23cm. Bind. ISBN 0 15 246503 0. Ŝatata fabela rakonto por infanoj. Prezo: 30,00 gld.

Evoluo de la trafiko kaj ĝia polucio, La, Hristo Marinov kaj Anna Székely. Sofio: Fervojista kaj Ekologia Sekcioj de BEA, 1984. 186p. Ilus. Mapoj, Mimeo. 21cm. Studoj pri ekologiaj aspektoj de la trafiko i.a. el Bulgario, Hungario, FR Germanio kaj Sovetunio. Prezo: 10,50 gld.

Facetoj, Rejna de Jong. Leiden: la aŭtoro, 1984. 42p. Mimeo. 21cm. Tridek kvar originalaj poemoj lirikaj, socikritikaj kaj humuraj. Prezo: 5,10 gld.

Haveno. Tekstoj kaj kanto de Nikolin' Pairoux. Komp. Claude Hastir. Namur: Niklau, 1984. 45 t/m. 18cm. Duflanka, stereofona disko. Du kantoj "Haveno" kaj "Doktoro Zamenhof" kun teksto en Esperanto, la franca, nederlanda, germana kaj angla. Prezo: 7,50 gld.


Historio de Aiŝa, aŭtoro neindikita. Buenos Aires: Amikareto, 1984. 54p. Ilus. Mimeo. 17cm. ISBN 950 562 877 3. Rakonto pri kontraŭstaro al despotismo. Prezo: 6,00 gld.

Insigno silka. Ronda 7,5cm. La vorto "Esperanto" supre kaj la stelo centre estas broditaj en verdo sur blanka fono. Sube "Internacia Lingvo" estas blanke brodita sur verda fono. Prezo: 5,10 gld.

Jubilea afiŝo, T. Sekelj kaj H. Gyurkovics. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. Plenkolora. Formatoj A3 (30×42cm) kaj A2 (42×60cm). Kun la vortoj "Esperanto 1887-1987" kaj spaco por aldona teksto. Prezo: po 15,00 gld. por 10 A3; po 21 gld. por 10 A2.

Kroniko el la historio de "Frateco" 1908-1983, Antonio Marco Botella. Zaragoza: "Frateco", 1983. 84p. 22cm. Historio de Esperanta Societo "Frateco" de Zaragoza, Hispanio. Prezo: 6,30 gld.

Language Behavior in International Organizations; Report, red. Jane Edwards kaj Humphrey Tonkin. Novjorko: Center for Research and Documentation on World Language Pro-



blems, 1984. 155p. 28cm. La kvin anglalingvaj kaj unu franc-lingva prelegoj de la 2a Konferenco de CED (Novjorko, 15 dec. 1983), kun komentoj kaj apendico pri CED. Prezo: 24,00 guldenoj.

Legolibro por kursanoj, komp. Odd Tangerud. Oslo: la kompilinto, 1984. 53p. Ilus. 23cm. ISBN 82 991075 1 2. Kolekto de 26 diversstemaj tekstoj por progresintoj. Prezo: 10,50 gld.

Lingua esperanto; Corso di base, R. Corsetti, M. La Torre, N. Vessella. Pisa: Edistudio, 1984. 302p. Ilus. 21cm. ISBN 88 7036 016 4. Dekkvin-leciona, gramatike strukturita lernolibro por itallingvaj komencantoj, kun ofteca vortlisto. Prezo: 33,00 guldenoj.

Lingvo kaj komunikado, div. aŭtoroj. Rotterdam: Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, 1984. 41p. Mimeo. 21cm. Sep artikoloj pri la lingva flanko de la komunikado. Prezo: 6,00 guldenoj.

Logika bazo de vortfarado en Esperanto, La (1910), René de Saussure (1872-1943). Saarbrücken: Arthur E. Iltis, 1984. 12p. Tabeloj. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 10. Foto-represo de siatempe influhava studo pri la teorio de la Esperanta vortkunmetado. Prezo: 5,90 gld.

Morta suito, La, Masao Miyamoto (1913). Kioto: L'Omni-buso, 1984. 169p. Ilus. 21cm. Vivrakonta romano pri la japana anarkiisto-esperantisto Sakae (Ei) Oosugi (1885-1923). Prezo: 36,90 gld.

Nova minaco al Eŭropo: kiu kulpas? El la rusa trad. V. Arolovič. Moskvo: Novosti (APN), 1984. 40p. Ilus. 22cm. Pri nuklea armado. Prezo: 3,00 gld.

Obstacles linguistiques face au nouvel ordre mondial de l'information et de la communication, Les, M. Mustapha Masmoudi. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 10p. 21cm. Documents sur l'Espéranto 15F. ISSN 0165-2621. Prelego el la inaŭguro de la Universala Kongreso en Antverpeno, 1982. Prezo: 3,00 gld.

Parnasa gvidlibro (1932), Kálmán Kalocsay (1891-1976), Gaston Waringhien (1901), Roger Bernard (1907). Pisa/Madrid: Edistudio/Heroldo de Esperanto, 1984 (3a eld.). 208p. 21cm. ISBN 88 7036 018 0. 'Manlibro de la Esperanta poetiko' reviziita kaj kompletigita de Gaston Waringhien. Unue la metrikon (ritmon, versojn, strofojn) analizas Waringhien, poste C.E.R. Bumi (= Kalocsay) en longa didaktika sed sprite atentokapta poemo donas valorajn konsilojn en sia 'Arto poetika', fine Waringhien kaj Bernard liveras ĝisdatan rimvortaron; kun glosaro. Prezo: 27,00 gld.

Pasporta servo de TEJO 1984. Rotterdam: TEJO, 1984. 64p. Ilus. Mapoj. 21cm. Listo de 689 gastigantoj el 51 landoj, utiligebla de ĉiu Esperanto-parolanta aĉetinto de la libreto. Prezo: 6,90 gld.

Poliglota vortaro, Mahmud Moŝkeri. Tehrano: la aŭtoro, 1984. 10+487p. Ilus. 25cm. Bind. Vortaro persa-angla-franca-itala-Esperanta, kun unuvortaj ekvivalentoj ordigitaj laŭ la persa. Prezo: 63,00 gld.

Radioteknika artikolaro, red. László Szilvási. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64p. (+20 paĝoj da reklamoj). Ilus. 24cm. ISBN 963 571 116 6. Kolekto de 23 altnivelaj artikoloj pri tre diversaj radioteknikaj temoj, kun terminareto kaj listo de eldonaĵoj. Prezo: 7,50 gld.

Ĉina monata gazeto en Esperanto



varbas abonantojn por 1985

La periodo de la abonvarba kampanjo komenciĝos je la 1-a de novembro 1984 kaj finiĝos je la 28-a de februaro 1985. Tiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en tiu periodo, povos senpage ricevi koloran Esperantan kalendaron por 1985 kaj mapon de la Ĉina Popola Respubliko en Esperanta eldono.

Abontarifo

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	9,00	15,00	21,00
Britio	GBP	5,00	8,50	12,00
Francio	FRF	60,00	100,00	144,00
FR Germanio	DEM	18,00	30,00	42,00
Hispanio	ESP	900	1 500	2 100
Italio	ITL	11 000	18 700	26 400
Japanio	JPY	2 000	3 500	5 000
Jugoslavio	YUD	300	500	700
Nederlando	NLG	22,00	37,00	52,00
Portugalio	PTE	700	1 190	1 680
Usono	USD	10,00	17,00	24,00
Kanado	CAD	10,00	17,00	24,00

por aliaj landoj en Eŭropo

GBP	5,00	8,50	12,00
USD	8,00	13,00	18,00

por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	2,80	4,50	6,50
USD	4,00	6,50	9,00

Abonvarbado estas bonvenigata.

La abonvarbantoj povos ricevi de ni ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia merito.

Tuj abonu ĉe la loka peranto

aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam (kiu tamen akceptas la abonojn nur laŭ la nederlanda tarifo) aŭ rekte turnu vin al la ĝenerala distribuanto: Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

La varbilon kaj senpagan specimenon ni sendos laŭ peto.

Svedaj birdoj; Vortlisto, Malte Markheden. Sjö Haga: la kompilinto, 1984. 29p. Mimeo. 21cm. Ornitologia terminareto dudirekta: sveda, Esperanta; kun aldono de la latina birdonomo. Prezo: 3,30 gld.


Unesco et l'UEA 1976-1983, L'. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 20p. 21cm. Documents sur l'Espéranto 18F. ISSN 0165-2621. Prezo: 3,00 gld.

Vortoj de Andreo Cseh, komp. Ed. Borsboom. Saarbrücken/De Bilt: Artur E. Iltis/Societo Andreo Ĉe, 1984. 208p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 6. Sesdek ses diversstemaj, simplastilaj artikoloj de la fama pedagogo Andreo Cseh (1895-1979), kiuj aperis Esperante en la nederlanda semajngazeto *Haagsche Post* en 1935-36. Prezo: 30,00 gld.

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Tria japana-korea seminario

La ideon de komuna seminario de japanaj kaj koreaj gejunuloj unuafoje proponis la tiama vicprezidanto de TEJO Amri Wandel en 1980. Korea Esperanto-Junularo iniciatis la unuan tian seminarion en 1982. De la 4a ĝis la 6a de aŭgusto ĉi-jare 38 japanaj,



107 koreaj kaj unu brita gejunuloj manifestaciis la vivecon de Esperanto per la 3a Komuna Esperanto-Seminario, ĉi-foje en la universitato Danguk en Ch'ŝnan.

Iuj diris, ke la seminaria temo "Junulo kaj Kulturo" estas tro abstrakta por efike prezentiĝi. La kvin prelegantoj (tri koreaj kaj du japanaj) traktis ĉefe la junularan kulturon surbaze de sialandaj fenomenoj. La plimulto de la partoprenantoj konsentis, ke la junularan kulturon karakterizas la kontraŭstaremo.

Okazis dek unu tre diversaj fakaj studoj (tri el Korea Respubliko kaj ok el Japanio), ekzemple "Lingvo kaj homo", "Ceramiko kaj te-ceremonio", "Amaferaj metaforoj en korea etnografiaĵo", "Metapsikio kaj spirita fenomeno", "Subkategoriado

de verboj kaj kategoriaj reguloj de Esperanto", "Tra dukado de kantoj". Ŝajnas, ke la prezentado de fakaj studoj estis pli alloga, ol studoj pri la seminaria temo.

Aldone al la akademiaj programeroj, kiel studoprezentoj kaj diskutoj pri la seminaria temo, la partoprenantoj ĝuis dramajn, sportajn kaj distrajn prezentadojn. Por la unua fojo en la historio de la korea Esperanto-movado oni ludis pupteatraĵon en Esperanto. Ĝin prezentis la korea pupteatra grupo Sonang-dang, kiu planas partopreni en la venontjara Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo. Kaj studentoj el la Esperanto-klubo de la japana universitato Wakō donis freŝan ridon al la ĉeestantaro per sia komika teatraĵo "Rakonto pri Hikoiti".

Malgraŭ la terure haŭtopika sunbrilo, entuziasmaj junuloj verŝis ŝviton sur la vastan sportejon por provi venki en la matĉoj de flugpilko kaj basbalo. Sed ne mankis maljunaj junuloj, kiuj pigre ĝuis la someran brizon en la maloftaj arbo-ombroj ĉirkaŭ la sportejo.

Efike allogis la vespera maskobalo. Portante tre fantaziplenajn maskojn, ĉiuj ĝisoste amuzis sin per diversaj distraĵoj, sin reŝargante per la freŝaj fruktoj kaj trinkaĵoj, kiuj abundis en la balejo.

Kantado ne mankis. En ombrodona pavilono oni unuigis voĉojn por pli bele prezenti "Antaŭ du jaroj", "Mi amas vin" ktp. Specialan kantaron por la seminario preparis Rondo Harmonia.

La lasta programero estis ekskurso al korea folkloro muzeo kaj la sanktejo Hyŝnĉ'ungsa, kiu donis al la japanaj samideanoj la ŝancon pli bone kompreni Koreion kaj ĝian popolon. Post la seminario japanaj esperantistoj ekskursis dum du tagoj al diversaj lokoj en kaj ĉirkaŭ Seulo.

Sinkritikemaj organizintoj trovis kelkajn mankojn en la seminario kaj tiel donas eblecon plibonigi la 4an Komunan Seminarion, kiu okazos en Japanio en la venonta jaro. Ne estis sufiĉa zorgado pri komencantoj, la seminaria temo estis tro abstrakta kaj ĝenis kelkaj bagateloj, kiel la manko de pantofloj kaj malmulteco de duŝejoj en la loĝejo, manko de aermalvarmigilo en la seminariejo ktp.

Korea Esperanto-Asocio, kunlabore kun la Universitato Danguk, sukcesis venigi filmistojn de du televidelsendejoj kaj raportistojn de diversaj ĵurnaloj.

La Komuna Seminario de la japana kaj korea junularoj nun havas firman lokon inter la tradiciaj Esperanto-aranĝoj de la du landoj. Ni esperas, ke en la venontaj jaroj gejunuloj ankaŭ el aliaj landoj malkovros niajn komunajn seminariojn.

Adressanĝo Haase: Bonvolu noti, ke la vicprezidanto de TEJO, Martin Haase, havas novan adreson: Cité univ. Daniel Faucher, Allée Prof. C. Soula, Bât. 8, ch. 1474, F-31000 Toulouse Cedex, Francio.

● **Brazilo:** En la 11a Gaŭĉa Renkontiĝo de Esperanto, kiu okazis en septembro en Porto Alegre, oni aranĝis intensan kurson de Esperanto kun apogo de la urba estraro. Studis 22 gelernantoj laŭ rekta metodo. Ĉiuj partoprenintoj jam enskribiĝis por hejmlokaj kursoj. La lokaj amaskomunikiloj amplekse informis pri la aranĝo.

● **Ĉinio:** La 2an de septembro la Esperanto-societo en Hangzhou okazigis lecion "Ĉu vi konas Esperanton?" de vicprofesoro Lü Moje. Ĉeestis 150 personoj. Poste la societo varbis por sia tria kurso de Esperanto, kiun partoprenas 115 lernantoj: docentoj, studentoj, kuracistoj, redaktoroj, servistoj kaj laboristoj.

● **Finnlando:** Ĵus aperis aparte bela turisma informilo en Esperanto pri la urbo Turku. Ĝi estas plenkolora kaj havas 28 paĝojn. Oni povas peti la informilon de: La Urba Vojaĝoficejo, Käsityöläiskatu 3, SF-20100 Turku 10, Finnlando.

● **Francio:** De la 9a de septembro 35 personoj partoprenis en trikursaj semajnoj en Sète. La duagradan kurson gvidis laŭ "la zagreba metodo" s-ino Spomenka Štimec el Jugoslavio.

● **Hispanio:** La urbo Valencia ĵus eldonis tri plenkolorajn turismajn broŝurojn en Esperanto: "Festoj kaj gastronomio", "Historio kaj arto" kaj "Itineroj". La broŝuroj estas senpage haveblaj de Grupo Esperanto de Valencio, Gran Vía Fernando el Católico 45-3º, Valencia-8, Hispanio.

● **Irlando:** La 6an de oktobro aperis du artikoloj pri Esperanto en la loka anglalingva ĵurnalo *The Tullamore Tribune*.

● **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto eldonis la unuan japanlingvan version de Esperanto-Dokumento de UEA. Ĝi estas la ok-paĝa *Esperanto en Unesko*, en kvanto de ok mil ekzempleroj, el kiuj kvin mil estas disdonitaj al la partoprenintoj de Unesko-aranĝoj en Japanio.

● La 3an de junio Jokohama Esperanto-Rondo partoprenis en la 3a Festivalo "Dontaku" de la urbo Yokohama. La vorto *dontaku* devenas el la neder-

landa *zondag* (dimanĉo), per kiu oni nomis siatempajn dimanĉajn festetojn de eksterlandanoj. Lokaj esperantistoj havis tendon kaj ekspoziciis leterojn, fotojn, librojn kaj gazetojn kaj informis pri la grupo kaj ĝia Esperanto-kurso.

● **Korea Respubliko:** Ĉiujare en la urbo Kwangju oni aranĝas kurson de Esperanto, pri kiu amplekse informas la lokaj amaskomunikiloj. Ĉi-jare tri radiokanaloj elsendis po du- aŭ trifoje sciigon dum 16 tagoj, kaj privata televida stacio dufoje. Ankaŭ loka ĵurnalo informis.

● **Nikaragvo:** Atingis nin informo, ke oni fondis en Nikaragvo grupojn de Blinduloj kaj Kristana Esperantista Ligo

Internacia. La grupo de blindaj esperantistoj jam lernis legi Esperantan brajlon kaj ĝi interrilatas kun Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Ili volonte ricevas el eksterlando materialon en brajlo: José D. Gaiton M., Apartado 3912, Managua, Nikaragvo.

● **Norvegio:** Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj ĵus eldonis en Esperanto 24-paĝan ilustritan broŝuron *Norvegujo*. Ĝi informas pri la historio, kulturo, socio, industrio ktp. de la lando kun i.a. ses paĝoj de plenkoloraj bildoj kaj mapoj. La broŝuro estas senpage ricevebla de Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousvei 18, N-0572 Oslo 5, Norvegio.




● **Ekspozicioj:** De la 6a ĝis la 11a de junio Bulgara Esperantista Asocio partoprenis la 16an Internacian Ekspozicion-Foiron de Librojn en Sofio. BEA elmontris librojn el 21 landoj, grandparte disponigitajn de Esperantaj eldonejoj kaj asocioj. La deĵorantoj de la Esperanto-stando respondis al multaj demandoj pri la eldona agado, Esperanto-kursoj kaj la Movado. Entute 300 000 personoj vizitis la ekspozicion, kiu okazas ĉiun duan jaron. BEA klopodos aranĝi similan standon ankaŭ en la estonteco.

● **Eldonprojektoj:** Esperanto-Centro Paderborn planas eldoni libron kun la titolo *Antaŭ la nova jarmilo: Ideoj por la vivo en mondo minacata*. Oni deziras, ke homoj el ĉiuj mondpartoj proponu kontribuojn. Pliajn detalojn donas d-ro W. Gunther, Friedrich Ebert-Str. 149, D-3500 Kassel, FR Germanio.

● **Poezio:** La poezia konkurso "Internacia Amikeco" 1984, aranĝita de

Triesta Esperanto-Asocio (Italio), altiris 30 originalajn poemojn el 12 landoj. La unuan premion gajnis s-ino Rejna de Jong el Nederlando pro "Maja tago". La duan premion dividis la poemoj "La blinda infano" de s-ino Pierisa Cavallero el Italio kaj "Doloro" de s-ino Eli Urbanová el Ĉeĥoslovakio. Oni aranĝos feston je la 16a de decembro por transdoni la premiojn kaj informi pri la Esperanta literaturo.



UEA anoncas la (re)aperon de

ESPERANTA ANTOLOGIO; POEMOJ 1887-1981

Universala Esperanto-Asocio eldonis ĉi tiun reprezentan poezian volumegon, sub la redakto de William Auld. Temas pri la dua eldono – abunde reviziita kaj kompletigita – de la iama “Esperanta antologio” (1958). En ĉi tiu preskaŭ 900-paĝa volumo – unu el la plej imponaj libroj en Esperanto – aperas 850 poemoj de 163 poetoj. Auld provizis la verkon per ampleksa postparolo pri la Esperanta poezia arto kaj per 36 paĝoj da biografiaj notoj.

Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981. Red. William Auld (1924). Rotterdam: UEA, 1984 (2a eld.). 12 + 871p. 22cm. Bindita. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Prezo: 60,00 guldenoj.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!


**Éva Tófalvi &
Oldřich Kníchal**

Kiuj semas plorante...

“Per *Kiuj semas plorante...* la Esperanta romano fariĝis pli riĉa. Estas aparte bona la primovada temo, delonge neglektita de niaj verkistoj.”

V. Benczik

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8. Prezo: 15,00 gld.



● **Fondusoj:** La raporto pri la financa jaro 1983-1984 de la brita Jubilea Esperanto-Fonduso Norwich, fondita en 1966 de s-ro E.F. Dean, sciigas, ke ĝi havas kapitalon de preskaŭ 19 500 pundoj (83 460 gld.). Per rento de 7 635 gld. ĝi ĉi-jare subtenis prelegvojaĝojn, studojn

ks. de plejparte junaj esperantistoj. La fonduso nun planas eldoni elektitajn raportojn de homoj, kies agadon ĝi mone apogis.

● **Kanto:** La 29an de aŭgusto en la bulgara ĉefurbo Sofio pli ol cent perso-

noj kantis en publika koncerto de esperantistaj ĥoroj antaŭ 1 200 aŭskultantoj.

● **Lingvo:** Aperas jam de kelkaj monatoj nova anglalingva revuo, kiu celas ĉiun, kiu laboras en aŭ interesiĝas pri lingvo-rilataj fakoj. La revuo nomiĝas *Language Monthly* kaj estas eldonata de Praetorius Ltd., 5 East Circus Street, Nottingham, NG1 5AH, Britio.

● **Naturo:** La 12a Kongreso de Naturamika Internacio, kiu okazis en Strasburgo de la 20a ĝis la 23a de septembro, akceptis proponon, ke oni disvastigu ĝian rezolucion pri la paco ankaŭ en Esperanto. La naturamika movado, naskiĝinta en 1895, estas parto de la laborista movado kaj de jardekoj subtenas Esperanton. La teksto de la rezolucio “Savu la pacon!” haveblas de: Naturamika Internacio, Birmensdorferstr. 19, CH-8004 Zürich, Svislando.

● **Tradukado:** Unuafoje en la historio de la bulgara Esperanto-movado oni organizis kurson pri tradukado. Ĝi okazis en Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica de la 18a ĝis la 31a de marto, gvidata de esperantologo Violin Oljanov, prezidanto de Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj. La multfla-



● **Hungario:** De 1981 aktivas en Hungario agad-grupo, kiu akiris la nomon “piratfiŝoj”! Ĝia filozofio estas kunigi la tri ofte apartajn kampojn de informado, lernado kaj edukado. Unu parto de ĝia agado estas organizi kvintagajn intensajn Esperanto-kursojn, en kiuj partoprenas eksterlandano. La foto montras tian kurson de s-ino Ida Telfera (meze, en robo).

kan kaj ampleksan kurson de 60 horoj partoprenis 20 tradukemuloj.

● **Vidbendoj kaj filmoj:** De la 29a de novembro ĝis la 2a de decembro okazos en Pula, Jugoslavio, Internacia Amatora Festivalo de Video kaj Filmo en Esperanto. Interesitoj bonvolu kontakti Kroatian Esperanto-Ligon, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Persone

● **Li:** Li Weilun, aŭtoro de i.a. la duvoluma lernolibro por ĉinlingvanoj *Elementa Esperanto-kurso* (1983) pasintan julion hejmenveturis al Ĉinio post preskaŭ dujara restado en Meksiko, kie li aktivis en la loka movado i.a. per instruado en Societo por Amikeco kun Ĉinio.

● **Verloren van Themaat:** Per sia nederlanda traduko de *La infana raso* de William Auld kaj siaj tradukoj de Esperantaj poemoj en la libro de tradukita poezio *Zeg, luister eens* (1981), d-ro Willem Verloren van Themaat akiris membrecon en Nederlanda Asocio de Tradukistoj. Pro ĉi tiu sukcesa laboro Verloren van Themaat ĉi-jare ricevis ankaŭ premion de Fondaĵo Grabowski (vd. *Esperanto*, p.153, 1984).

● **Thatcher:** En februaro ĉi-jare la ĉefredaktoro de la revuo *Világ és nyelv* (Mondo kaj lingvo), Imre Szenes, kaj aliaj hungaraj esperantistoj skribis al la brita ĉefministriro Margaret Thatcher malferman leteron (vd. *Világ és nyelv*, 1/1984), okaze de ŝia tiam venonta vizito al Hungario. Responde al la letero, Ian R. Murray de la gazetara oficejo de la ĉefministro skribis je la 29a de junio: "La Ĉefministro petis min respondi al via letero kaj al ĝia kunsendita malferma letero pri Esperanto. ... Ni legis kaj pripenis vian malferman leteron kun intereso kaj ni deziras al vi kaj al ĉiuj ligitaj kun "Mondo kaj lingvo" sukceson en viaj provoj antaŭenigi la pli vastan uzon de Esperanto. Klare, internacie akceptita komuna lingvo povus havi nombron de avantaĝoj por la flegado de reciproka komprenado inter la landoj de la mondo, sed ni kredas, ke estus tre malfacile konsideri ĝin kiel praktikan proponon. Estas la politiko de la Registaro de Ŝia Reĝina Moŝto antaŭenigi la uzon de la angla kiel internacian lingvon, kaj ja ĝi estas rekonita kiel tia de granda nombro



● **Paco:** La 10an de julio la urbestriro de la angla urbo Eastleigh, Margaret Kyrle, subskribis pac-alvokon de la Esperanto-grupo de Eastleigh kiel la dumila subtenanto. La grupo kolektas subskribojn de individuoj, akiras apogon de lokaj organizaĵoj kaj rekomendas ĝemeligon de Esperanto-klubo.

● **Vogelmann:** Invitite de Ĉina Esperanto-Ligo, Bruno Vogelmann, Honora de internaciaj organizaĵoj. Dankon pro via atentigo pri ĉi tiu interesa temo."

Membro de UEA, faris rondvojaĝon en Ĉinio dum pli ol tri semajnoj en septembro. Li prelegis en Esperanto kaj diversloke renkontiĝis kun ĉinaj esperantistoj.

Oficiala Informilo

KOTIZPERANTOJ

KANADA KAJ KOLOMBIA

Ni anoncas por Kolombio novan kotizan kaj delegitan peranton, kiu tuj ekdeĵoras. Li estas s-ro Santiago Alvarez G., Apartado aéreo 54-800, Bogotá 2. Ni dankas al s-ro Luis Restrepo, la antaŭa peranto. En la jarfino ŝanĝigos la kotizperanto kaj ĉefdelegito en Kanado. Oficis tie dum 30 jaroj s-ro W.D.B. Hackett, al kiu la Asocio kore dankas pro multjara kaj sindediĉa servado. La nova oficanto estas s-ino Merle Hal-trecht-Matte, 7083 Notre Dame, Orléans, Ont. K1C 1J1.

KOREKTO POR JARLIBRO 1984

La teksto sub Kongo sur p.289 devus legiĝi: **D** kaj **FD** (bestobredado; lingvolernado; terkulturado; turismo): Malonga Matuba Ngingi, p/a Fataky Albert, 69 rue Bangui, Mongali Poto-Poto, Brazzaville.

SOCIETO ZAMENHOF 1984

Brazilo: Denise A. Deslandes; Wilson Deslandes. FR Germanio: Heinz Schindler. Francio: François Lo Jacomo.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Japanio: Yosimi Umeda.

DONACOJ 1984 (Gld.)

ĝis la 9a de oktobro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Japanio: Yosimi Umeda 336,00. Kanado: Dorothy Hawley 1 197,50. Sumo ĉi-jara 9 218,98.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 60,00. Sumo ĉi-jara 1 680,40.

ĜENERALA KASO: Usono: Armin F. Doneis 596,85. Diversaj malgrandaj 6,20. Sumo ĉi-jara 1 626,11.

JUBILEA JARO: Danlando: Astrid Birkbak 40,00. Kanado: Dorothy

Hawley 1 286,63. Nederlando: Evert J. Woessink 870,00; Haga Sekcio de NEA 250,00. Sumo ĉi-jara 5 423,37.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): F.R. Germanio: Ruth Paintner-Trumpp 450,68. Sumo ĉi-jara 4 057,94.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Israelo: Jeraĥmiel Giladi 38,75. Japanio: Teiiti Kikuti 276,00. Sumo ĉi-jara 619,75.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA PATRONOJ (minimуме \$100): Finnlando: Liisi Oterma. Japanio: Rokurō Turuno; Yosimi Umeda. Kanado: Bruce R. Crisp; Dorothy M. Hawley. Usono: Alfred Unterberg; Joan Gildemeister; John A. Mathews; Lucille H. Thompson; Martin Leonard; Sidney V. Steinberg. **SUBTENANTOJ** (minimуме \$25): Aŭstralio: Ralph Harry. Francio: Eliane Lo Jacomo; François Lo Jacomo. Kanado: Janet Warren. Svislando: Paul Bächli; Konrad Rey-Zollinger. **AMIKOJ** (minimуме \$10): Britio: Walter H. Hawkins; Mary Broadhead. Hispanio: Ada Fighiera-Sikorska. Jamajko: Arpad Ronai. Japanio: Hisako Matuda; Mitunobu Sinoda. Luksemburgo: Brian R. Moon. Svedio: Gunilla Sundholm. Svislando: Gertrud Weigelt. Usono: John Cunningham.

PATRONOJ DE TEJO 1984
FR Germanio: Erdman Fritsch. Nederlando: M. Meywes.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologo

IVAN BRATOŠ (1896-1984) mortis la 16an de aŭgusto en Maribor, Jugoslavio. Li lernis Esperanton en 1924 kaj plurfoje estis funkciulo de la loka Esperanto-societo. Li krome aktivis kiel peranto de *El popola Ĉinio* kaj delegito de UEA.

HERBERT DAVIES mortis antaŭ kelka tempo en Manĉestro, Britio. Li estis dumviva membro de UEA.

ERIKA LINZ (1895-1984) forpasis la 17an de septembro en Vieno, Aŭstrio. Ŝi estis membro de UEA ekde 1946 kaj dum pluraj jaroj fakdelegito pri terkulturado.

JOHANO LLECH forpasis la 6an de aŭgusto en Perpignan, Francio. En 1930

li fondis la esperantistan federacion Languedoc-Roussillon.

JAN MOERBEEK (1909-1984) forpasis la 3an de oktobro en Zeist, Nederlando. Li lernis Esperanton en 1926 kaj estis dumviva membro de UEA.

LILY PALMER (1917-1984) mortis antaŭ kelka tempo en Diss, Britio. Ŝi estis la loka delegito kaj fakdelegito pri SOS-aŭtoservo.

JACOBUS S. ROOKE (1900-1984) forpasis antaŭ nelonge en Ermelo, Nederlando. Li estis dum pluraj jaroj membro de Societo Zamenhof kaj mecenato de diversaj fondusoj de UEA.

ALBERT SAMYN mortis antaŭ kelka tempo en Bruselo, Belgio. Li estis

konata ĉefe per siaj tradukoj kaj originala prozo, gajninto de multnombraj premioj de Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1959. Li kunlaboris kiel grava verkanto en la revuo *Monda kulturo* (1962-66). Li estis membro de UEA ekde 1951.

IVAN ŠTEFANISKO mortis antaŭ nelonge en Svidník, Ĉeĥoslovakio. Li funkciis dum kelkaj jaroj kiel la loka delegito de UEA.

HENDRIK VALKENBURG forpasis la 30an de aŭgusto en Oegstgeest, Nederlando. Li estis membro de UEA ekde 1961.

KLARA WALDEN (1886-1984) mortis la 29an de julio en Ystad, Svedio. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj delegito dum multaj jaroj ekde 1936.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Kiu nacilingva urbonomo signifas Ruĝa Pordo? Ĝemeliĝcele skribu al: Blottnitz, Marcolaan 8, Florida Glen, RSA-1710 Roodepoort, Sud-Afriko.

Vivkamaradinon (edzinon) serĉas bonstata emerita komercisto en FR Germanio, 65-jara, blindiĝinta, kun intereso pri naturo, promenado, vojaĝoj, muziko kaj teatraĵoj. Bv. skribi al s-ro Karl-Heinz Hoffmann, J. Kaiserstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio.

Sidibé Oumarou, B.P.231, Banfora, Burkina Faso/Voltio, 26-jara publika skribisto kaj komercisto, deziras korespondi kaj komerci kun esperantistoj, precipe pri nutraĵoj, ekz. importo de rizo, maizo, sorgo kontraŭ eksporto de sezamo, arakidoj, kariti-amendo. Certe respondos.

Filatelisto serĉas korespondantojn i.a. por interŝanĝi poŝtmarkojn. S-ro Henryk Osinski, ul. Księżycowa 9 m 25, PL-42-211 Częstochowa, Pollando.

Deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn s-ro Pan Gohua, Sheshan Xishanpo 49-hao, Wuchang, Hubei, PR Ĉinio.

Naŭjara knabo deziras korespondi tutmonde: Juris Rāts, Vecais celš 19, SU-229604 Jelgava, Latvio, Sovetunio.

Korespondi ĉien deziras s-ro Bradley Kendal, 75 Marco Ave., Revesby 2212, Aŭstralio.

Ian Tarrant kaj Sally Barton informas siajn konatojn pri nova adreso: 38 Airedale Road, London, Anglujo W5 4SD. (☎ 01 567 6926.) Novaj korespondantoj ne dezirataj.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Esperanto-araba poŝvortaro (1968), 285p. 17cm. Bindita. La Libroservo de UEA disponas pri plurdeko da ekzempleroj de ĉi tiu delonge elĉerpita vortaro de Nassif Isaac kontraŭ 12,00 gld. plus sendokostoj. Ĝi disponas ankaŭ pri *Esperanto-araba lernolibro* (17p. 23cm.) kontraŭ 6,00 gld. plus sendokostoj.

Restas nur kelkaj ĉambroj...

Internacia Esperanto-Semajno en Nico, 30 marto-6 aprilo 1985. Kursoj matene, ekskursoj posttagmeze. Ĉio inkl. en hotelo po 1 395 F.F. por persono. Aliĝu: Llorens, Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

INTERNACIA KOMPUTADO

MIKROKOMPUTILOJ
+ **VARIAJ TEMOJ**
+ **MODESTA PREZO**

= **INTERNACIA
KOMPUTADO**

Eleganta revuo, interesa legaĵo ne nur por komputistoj! Kvaronjare 64 paĝoj! Abonu kaj donacu jarabonon al verdigendoj kaj institucioj! Tujare aboneblas en trideko da landoj sur ĉiuj kontinentoj (detale vidu la kovrilpaĝon de la Jarlibro). Ĉe UEA 24 ned. guldenoj.

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la

Koresponda Servo Mondskala de UEA

Adreso: KSM, p/a s-ro R. Llorens,
121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

LA JARO 1985

Ankaŭ en 1985 aperos – por la kvina fojo – la unika poŝ-kalendaro LA JARO kun multaj praktikaj kaj utilaj informoj. Sur 160 paĝoj vi trovas ne nur kalendaron kun la festotagoj de la diversaj landoj kaj mondreligioj, sed ankaŭ plej diversajn listojn kaj tabelojn, de geografio ĝis matematiko, ĵuloj kaj spicoj. Krome LA JARO enhavas kvar-lingvan vortareton kaj la fundamenton de Esperanto. En 1985 aperos aktualigita listo de landoj.

Ideala akompananto tra la jaro – kaj ideala donaceto vere favorpreza: nur 10 germanaj markoj aŭ egalvaloro (inkl. sendokostojn). Tuj mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ ĉe: **FLANDRA ESPERANTO-LIGO, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, poŝtkonto 000-0265338-43.**

LA JARO estas unu el la multaj bonaj ideoj de MONATO internacia magazino sendependa

NOVA INTERNACIA REVUO POR DISTRO KAJ AMUZO

OVO-
-ENHAVO:

bildstrioj, humuraĵoj,
sciencfikcio, (ne)kutimaj
intervjuoj, internacia helpo,
favoraj vojaĝeblecoj, konkursoj,
ŝercoj kaj satiroj pri la E-movado,
distraj interesaĵoj, detektivaj romanoj,
naturfenomenoj kaj . . . pluraj surprizoj.

OVO-legaĵoj estas ĉiam aktualaj kaj konvenaj por ĉiu aĝo kaj ĉiu lingvokona nivelo de Esperanto. OVO precipe konvenas al KOMENCANTOJ.

OVO aperos ĈIUN 3-an SEMAJNON ekde septembro 1984. JARABONO estas 35 nederlandaj guldenoj (aŭ egalvaloro). RABATO: pagantoj ĝis la fino de aŭgusto 1984 pagas nur 29 nederlandajn guldenojn.

Je 10 abonoj unu senpage!

Viajn OVO-numerojn vi povas mendi kaj aboni ĉe INTERNACIA KULTURA SERVO, 41000

Zagreb, Amruševa 5/1, Jugoslavio.

Bonvolu peti provnumeron!

Z14

Lernometodo de Esperanto kreita de zagrebaj esperantistoj ba-
ziĝas je logika strukturo de Esperanto mem, kaj je la rezultoj de
vortofteca esplorado de parolata Esperanto. La antaŭaj eldonoj
de la lernolibro laŭ la ZM jam estas adaptitaj al 15 lingvoj.
Kromaj help- kaj ekzercomaterialoj, akompanantaj la lernolibron,
ebligas tre sukcesan memlernadon, aparte en grupoj kaj kursoj
sen tradicia, preleg-predika, funkcio de instruisto. La metodo
aplikeblas ankaŭ por rapidegaj, t.n. semajnfinaj kursoj. La plej
nova (6-a) eldono de la lernolibro ebligas ankaŭ la INTERNACI-
AJN KURSOJN, kun partoprenantoj el diverslingvaj landoj, ĉar ĝi
estas eldonita, en tute identa formo, en la GERMANA, ITALIA,
HUNGARA, KROATSERBA, FRANCA kaj ANGLA lingvoj.

la zagreba metodo

Kom-
pleto
por la baza
(A) kurso de
Esperanto laŭ
la ZM konsistas el:

- 1 – LERNOLIBRO ...6 gld
- 2 – KASETO kun tekstoj kaj
kantoj el la lernolibro10 gld
- 3 – „KIU ESTAS JOZEFO?“
ekzercobildstrio3 gld
- 4 – LA SENTIMULO - romano en facila
Esperanto9 gld
- 5 – Instrukcioj por instruistoj1,5 gld

Rabatoj:

- La kompleto + 1-jara abono al „OVO“ ...50 gld.
- Por mendoj de minimume 25 lernolibroj kaj 25 bild-
strioj oni ricevas senpage 1 kompletan + „OVO“-jarabonon
- Por minimuma mendo de 10 ekzempleroj de lernolibro
aŭ bildstrio aŭ „La Sentimulo“ oni ricevas 50% rabaton.

Mendoj ĉe : Internacia Kultura Servo, YU-41000 Zagreb,
Amruševa 5/1

(041) 424-660





Antikvaj turoj kaj pordegoj, imponaj muroj: jen en norda Bavario (FR Germanio) la fabela urbo

Kronach

kun siaj pitoreskaj stratoj kaj beletaj domoj, kronita de mezepoka fortikaĵo, meze en arbaroriĉa montoregiono, malfore de famkonataj kaj nepre vizitindaj lokoj.

Ĉu vi notis jam, ke okazos ĉi tie post la 70-a UK internacia feriosemajno de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1985 kun vere alloga programo? Petu informojn de

Fremdverkehrsamt
Postfach 510
D-8640 Kronach, FR Germanio

Aldoniĝu al la homoj en kontakto



Pli ol mil kvincent homoj estas en kontakto per *Kontakto*! Ekde 1985, estu ankaŭ vi! Vidu la temojn de la venontaj kvin numeroj. Ĉiuj interesaj, ĉiuj traktataj de junaj verkistoj el plej diversaj landoj. Eĉ la lasta temo (IJJ) iĝas interesa, kiam ni malkaŝas ke IJJ estas la Internacia Junulara Jaro, proklamita de UN por 1985. Parto de tiu numero esploras junularajn problemojn: senlaboreco, izoleco, lernejoj ktp.

Kontakto aperas 6-foje jare sur 16 paĝoj. Per simpla lingvaĵo kaj abundaj ilustraĵoj ĝi ligos vin kun nova mondo de ideoj. Junaj membroj de UEA ricevas ĝin sen plia pago. Aliaj povas aboni ĝin ĉe la kotizperantoj de UEA aŭ ĉe la CO. La abontarifo estas modera kaj varias laŭlande.

Kursgvidantoj: *Kontakto* donas idealan legomaterialon por viaj lernantoj. Ĉiu artikolo portas facilec-indikon kaj vort-klariĝojn. Ĝi helpas en via tasko transformi studantojn en uzantojn de la lingvo. Se vi prenas minimume 10 ekzemplerojn, vi povas ĝui rabaton de 40% ĝis 60%. Petu de la CO detalojn pri kolektiva abono!

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 64 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (37 guldenoj; por Nederlando 38,65 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

